

V-19034 / 1980 Esperanto

EL POPOLA CINIO

中國報

1980




Baleto



Yingniang inspiras per danco al la patro en pentrado.

La baleto priskribas zigzagajn travivaĵojn de maljuna pentristo Magia Peniko Zhang de Tang-dinastio (618-907 p.K.) kaj lia filino Yingniang kaj la intiman rilaton inter ili kaj persa komercisto Inus, kaj prikantas la tradician amikecon inter la ĉina kaj persa popoloj.




La persa Danco de Ĉevala Tintilo

“Sur la Silka Vojo”



Yingniang dancas persan dancon en la hejmo de Inus



Danco de Hindaj Knabinoj en la foiro

La persa Drinka Danco





Yingniang adiaŭas Persion por reveni al sia hejmlando kune kun Inus.



Kolektiva danco de 16 knabinoj

Monata gazeto eldonata de ĈINA ESPERANTO-LIGO P.O. Kesto 77, Beijing, Ĉinio

SUR LA KOVRILO:

Juna aktorino He Yanyun ludas la protagoniston Yingniang en la baletto "Sur la Silka Vojo". Ŝi sukcese modlis figuron de saĝa, bela kaj bonkora antikva ĉina knabino per ok soloj en la baletto. La kovrilo montras, ke en la amikiĝa kunveno kun partopreno de 27 landoj en Dunhuang, Yingniang malkaŝas krimon de la foira administranto, dancante alivestita sur telero.

BILDPAĜOJ:

1. KOLORA SERIO
Baletto "Sur la Silka Vojo"
2. NIGRA-BLANKA SERIO
(1) Ministo Lu Jinshui
(2) Mara Petrol-kolektado
3. KOLORA SERIO
La monto Huangshan
4. NIGRA-BLANKA SERIO
(1) Ji-nacia bredistino
(skulptaĵo)
de Yuan Xiaocen
(2) La torĉa festo de la Ji-oj
5. KOLORA SERIO
(1) Fotografiaj verkoj de esperantistoj
(2) Ĉasisto forjetinta sian pafilon (bildrakonto)
de la Shanghai-a Belarta Studio

SUR LA DORSKOVRILO:

Pavoj (Ĉinstila pentraĵo)
de YUAN XIAOCEN

Generala distribuanto: Esperanta
Sekcio de GUOZI SHUDIAN
P.O. Kesto 313, Beijing, Ĉinio

Enhavo

Novjara mesaĝo	2
La verda stelo brilu ankoraŭ pli forte en Ĉinio	3
NIA KULTIVEJO: Lingva problemo en sciencoj kaj rolo de Esperanto	4
ESP-NOVAĴOJ	7
Pri la perspektivo de energio en la mondo	9
Iom pri la riĉfontoj de energio en Ĉinio	12
Metano — nova hejtajo en ĉina kamparo	15
Sur la putobora ŝipo "Bohai n-ro 1"	17
Pri la ŝosea persontrafiko en Yantai-subprovinco	19
VIDINDAJ LOKOJ: LA kvar mirindaĵoj de la monto Huangshan	22
Superklasa instruistino Liu Yufang	25
Steletto en pentrarto	27
Elektto de la perlo (novelo)	29
Pri la skulpturo kaj pikturo de Yuan Xiaocen	31
Baletto "Sur la Silka Vojo"	33
KURANTAJ AFEROJ	34, 43
EN LA REGIONOJ DE NACIMALPLIMULTOJ: Vojaĝo en Dixi	36
EL ĈINA MODERNA HISTORIO: La fondiĝo de la Komunista Partio de Ĉinio	38
KULTURAJ NOTOJ	42
Suspektemo	43
TRA LA MONDO	44
POR INTERKOMPREENIĜO	47
INTER NI	48

Novjara Mesaĝo

Karaj legantoj,

Venis la nova jaro — la jaro 1980.

Permesu al ni esprimi al vi, niaj novaj kaj malnovaj legantoj, perantoj kaj ĉiuj amikoj zorgantaj kaj subtenantaj nian gazeton, varman novjaran saluton kaj bondeziron de feliĉo kaj ĝojo.

Nova jaro signifas novajn esperojn, novajn klopodojn kaj novajn sukcesojn. En la nova jaro ankaŭ nia gazeto “El Popola Ĉinio” faros sian etan kontribuon por plifortigi la interkomprenon kaj amikecon inter la popoloj kaj geesperantistoj de Ĉinio kaj aliaj landoj, defendi la mondan pacon kaj akceli la disvastigon de Esperanto kaj la disvolviĝon de la Esperanta movado. Por ke nia gazeto estu pli bone karakterizata per Esperanto kaj ŝatata de diverslandaj esperantistoj, ni pluapaŝe bonigos ĝin enhance kaj forme.

En la nova jaro, nia gazeto starigos novajn rubrikojn. Inter ili troviĝas “Nia Kultivejo”, por kiu ni speciale invitos famajn kaj fakajn esperantistojn ĉinajn kaj alilandajn skribi artikolojn pri Esperanto, lingva problemoj kaj aliaj interesaj temoj. Ni havis honoron inviti d-ron Tonkin, prezidanton de la Universala Esperanto-Asocio, skribi artikolon por nia gazeto. Ni ankaŭ invitis s-ron Milojeviĉ, redaktoron de “Esperanto”, la organo de UEA, kiel kontribuanton por nia gazeto kaj li konsentis ofte provizi nin per diversaj informoj pri Esperanto kaj skribi por nia gazeto artikolojn pri la internacia Esperanta movado.

Por fortigi nian komuniĝon kun diverslandaj esperantistoj, ni aperigos leterojn de niaj legantoj sub la rubriko “Inter Ni” kaj respondos, se necese, demandojn de la legantoj. Ni arde esperas, ke niaj karaj legantoj ofte skribos al ni siajn opiniojn, kritikojn kaj precipe proponojn

por plibonigo de la enhavo kaj formo de nia gazeto.

Ankaŭ “Tra la Mondo” estas nova. Ĝi konigos al vi diverslandajn morojn, kutimojn, pitoreskejojn, historiajn vizitindejojn, anekdotojn k.a. kun naciaj aŭ lokaj karakterizaĵoj. Ni kredas, ke ĝi plaĉos al vi. Kvankam en la komenco ni devas elekti por ĝi materialojn el ĵurnaloj kaj gazetoj, ni preferas kontribuojn de diverslandaj legantoj por ĝin pliriĉigi. Estos tre bone, se la kontribuantoj sendos al ni taŭgajn fotojn aŭ desegnaĵojn. Estas menciinde, ke la rubriko “Fotoj pri Naturaj Belaĵoj faritaj de E-istoj” estas efektive rubriko “Tra la Mondo” en bildoj, kaj ĝi estas ŝatata de diverslandaj legantoj. Ni dankas la kontribuantojn al tiu rubriko kaj kore esperas, ke ili daŭre kunlaboros kun ni, kaj ankaŭ ke aliaj esperantistoj amatoroj-fotografistoj sendos al ni belajn fotojn por la gazeto.

Multaj legantoj skribis al ni, ke ni pli multe raportu pri la Esperanta movado de Ĉinio kaj aliaj landoj, precipe pri disvolviĝo de la Esperanta afero en la tria mondo. Koncerne al tio ni faros klopodojn kaj esperas, ke diverslandaj Esperantaj organizoj kaj aktivuloj nin helpos.

“Ĉina Moderna Historio” interesis iujn legantojn. Ekde la kuranta jaro ni sisteme konigos al vi la ĉinan historion en la periodo post la Movado de la Kvara de Majo de 1919.

Iuj legantoj proponis, ke nia gazeto aperigu karikaturojn, humuraĵojn, ludojn k.a. Por pli-interesigi la gazeton, ni ĝoje akceptas iliajn proponojn kaj faros necesan aranĝon.

Koncerne al la rubrikoj “Tra Ĉinio”, “En la Regionoj de Nacimalplimulto”, “Amikeco”, “Kurantaj Aferoj”, “Historiaj Objektoj” kaj “Kalejdoskopoj”, ni faros iom da novigo kaj reformo por riĉigi ilian enhavon. Samtempe, ni

La Verda Stelo Brilu Ankoraŭ Pli Forte en Ĉinio

K-do Wu Yuzhang (1878-1966) estis membro de la Centra Komitato de la Komunista Partio de Ĉinio, estro de la Komitato por Reformo de la Ĉina Skribolingvo kaj rektoro de la Ĉina Popola Universitato. Li sin okupadis per esplorado pri reformo de la ĉina skribolingvo dum multaj jaroj. Frue en la tridekaj kaj kvardekaj jaroj li jam aktive subtenis Esperanto-movadon kaj metis varman zorgon al la Esperanta laboro de Ĉinio. Jene ni aperigas parton de lia parolado pri Esperanto.

La Red.

MI entuziasme subtenas disvolvon de la nova kulturo de la ĉina nacio pere de disvolvo de la nova ĉinlingva latiniga skribosistemo, sed samtempe mi aprobas la Esperantomovadon. Tio signifas, ke mi kredas, ke la tuta mondo havos unuecan lingvon en malproksima estonteco. Tamen mi nun klopodas por disvolvi la lingvojn de diversaj nacioj. Ĉu tio

ne estas kontraŭdiro? Jes, vere kontraŭdiro. Ĝuste kiel Lenin iutempe prezentis la nacian aŭtonomecon per la formulo “apartiĝo por unuiĝo”, tio estas simpla vero de la marksisma dialektiko. Ĉar la nuna homaro ankoraŭ ne progresis ĝis tia grado, ke ĉiuj nacioj dissolviĝas en unu tuton sen ia ajn limo. Se ni nun uzus unu komunan lingvon anstataŭ la lingvoj de ĉiuj

nacioj, tiu deviga unuigo estus burĝara naciismo, kaj mi firme oponas kontraŭ tia faro. Tial mi persistas en tio, ke ĉiu nacio havu sian propran lingvon kaj daŭre elvolu la elitajn parton de sia lingvo. Elĉerpante bonajn elementojn el la internacia lingvo oni disvolu kaj reformu la nacian lingvon, adaptu ĝin al postuloj de scienco kaj popolo kaj faru ĝin vere efika instru-

pli multe raportos pri ĉinaj historio, geografio, kulturo, arto, pitoreskejoj, historiaj vizitindejoj, la vivo de diversstavalaj popolanoj por variigi kaj vigligi nian gazeton.

Unuvorte, ni volas fari “El Popola Ĉinio” vere Esperanta revuo de la esperantistoj de Ĉinio kaj aliaj landoj. En pli ĝusta diro, ĝi devas fariĝi vere NIA GAZETO por diverslandaj esperantistoj. Tio estas la celajo de nia redakcio en la nova jaro. Kompreneble, ĝia efektivigo dependas de la klopodado de ni mem, kaj ankoraŭ de la forta subteno kaj intima kunlaboro de niaj diverslandaj legantoj.

Krome, ni ankoraŭ sciigas niajn legantojn, ke nia redakcio eldonos de tempo al tempo librojn

kaj albumojn ŝatatajn de esperantistoj. Ni esperas, ke niaj legantoj varme nin helpos ankoraŭ en tiu flanko.

Fine, permesu al ni kore danki la perantojn, kiuj aktive helpis nin kolekti abonantojn, la amikojn, kiuj havigis al nia gazeto pli multajn legantojn per ekspozicioj, represo de ĉerpaĵoj el ĝi kaj publikigo de tradukaĵoj de ĝiaj artikoloj, la legantojn, kiuj ofte prezentis al ni kritikojn kaj proponojn por plibonigi nian gazeton, la amikojn de radiostacioj kaj redakcioj, kiuj faris anoncojn aŭ prezenton pri nia gazeto. Ni kore esperas, ke ili daŭre nin subtenos kaj helpos.

La Red.



Lingva problemo en sciencoj kaj rolo de Esperanto

de OUYANG WENDAO*

EN la nuna mondo iras tre vastaj sciencaj kaj kulturaj interŝanĝoj inter diversaj landoj. Pro la mirinda kresko de la kvanto de la scienca literaturo oni komencis atenti la lingvan problemon en sciencoj.

Laŭ takso de iuj specialistoj, 60% de la scienca literaturo de

la mondo en iuj fakoj estis publikigitaj en la angla lingvo kaj 40% en la rusa, germana, franca, japana kaj aliaj lingvoj. Se ĝenerale estas tiel, kaj sciencaj kaj teknikaj laborantoj posedas nur unu lingvon, tiam tre granda kvanto da scienca literaturo en aliaj lingvoj ne povas esti

ĝustatempe utiligata, kio ja estas perdo por la disvolviĝo de niaj sciencoj. Por solvi tiun problemon, multaj landoj devis fondi necesajn instituciojn por traduki

* La aŭtoro estas laboranto de la Aŭtomatiga Instituto de la Ĉina Akademio de Sciencoj.


mento por krei novan nacian kulturon kaj ĝeneraligi edukadon de popolamasoj. Nur tia maniera evoluigo de la kulturo de ĉiu nacio favoros eliminadon de la naciaj lingvoj kaj kuniĝon de ili en unuecan ĝeneralan lingvon, kiam triumfos socialismo en la tuta mondo.

Ĝuste kiel Stalin diris, la lingvoj de diversaj nacioj neeviteble dissolviĝos en unuecan lingvon en la estonteco. Kia estos la lingvo? Hodiaŭ oni ne povas prognozi pri ĝi. Tamen ni scias, ke ĝi certe ne estos la rusa lingvo, nek la franca, angla aŭ germana. . . Kompreneble, ĝi ankaŭ ne estos la ĉinaj ideografioj. Ĉu ĝi estos la nuna Esperanto? Ankoraŭ mankas al mi la bazo por tion aserti kun certeco. Sed tio ne malhelpas min aprobi la Esperanto-movadon, ĉar ĝi estas progresema kaj strebanta en la ĝenerala direkto

de unueca lingvo de la mondo. Nun en diversaj lokoj de la mondo fondiĝis multaj Esperanto-organizaĵoj, kaj esperantistoj de diversaj landoj povas korespondi inter si kaj helpas popolojn en reciproka interkompreniĝo kaj unuiĝo. Krome, Esperanto ludas rolon en interkomunikado de la ĉina kaj alinaciaj lingvoj. La lingvoj de la eŭropaj landoj estas relative proksimaj, dum la ĉina lingvo havas tre malmultajn rilatojn kun aliaj lingvoj. Pro tio la ĉinoj lernas fremdlingvojn malfacile. Esperanto estas facile lernebla. Post mallonga lernado oni povas ĝin uzi, tial ĝi povas servi kiel ponto por ĉinoj en lerno de fremdaj lingvoj. Ankaŭ tio estas supereco de Esperanto. Multaj internaciaj radikoj de Esperanto helpas nin en internaciigo de nia lingvo. Mi havas multajn motivojn por aprobi Esperanto-movadon. Mi

deziras, ke la verda stelo brilu ankoraŭ pli forte en Ĉinio!

Kamarado Wu Yuzhang



kaj aperigi informojn kaj periodaĵojn. Ĉiujare multaj homaj kaj materiaj fortoj konsumiĝis en tiu laboro, tial ĝi jam fariĝis granda ŝarĝo por la tuta mondo. Malgraŭ tio, ĝi ankoraŭ ne povas konformigi sin al la progresado de sciencoj kaj kontentigi la bezonon de scienca interŝanĝo inter diversaj landoj, nek solvi la lingvajn malfacilojn antaŭ diverslandaj sciencaj laborantoj.

Krome, ĉiujare en la mondo okazas centoj da sciencaj konferencoj kaj fakaj simpozioj kaj kunsidoj, kiuj donas bonajn ŝancojn por ĝustatempe koni plej novajn sciencajn atingojn kaj interŝanĝi sciencajn vidpunktojn. Tamen la lingva baro multe reduktis la efektivajn rezultojn rikoltendajn de tiuj konferencoj.

La lingva problemo en sciencoj estas des pli urĝe solvenda por la ĉinaj sciencaj kaj teknikaj laborantoj. Nun Ĉinio entreprenas konstruadon de la kvar modernigoj kaj por tio niaj sciencaj kaj teknikaj laborantoj devas multe lerni avangardajn sciencojn kaj sperton de aliaj landoj kaj disvolvi sciencajn kaj kulturajn interŝanĝojn kun ili. Pro la urĝa bezono por efektiviĝi la kvar modernigojn, niaj sciencaj laborantoj nun aktive lernas la anglan, francan, japanan, germanan, rusan kaj aliajn fremdajn lingvojn. Ĉar la ĉina lingvo multe diferencas de la eŭropaj, estas imagebla la malfacileco en ilia lernado de tiuj lingvoj. La ĉinaj sciencaj kaj teknikaj laborantoj devas elspezi sufiĉe multe da tempo por lerni fremdajn lingvojn dum la tuta vivo. Ordinare ili lernas unu fremdan lingvon 5-6 jarojn en mezlernejo kaj poste 1-2 jarojn

Ouyang Wendao (la dua de dekstre) interparolas kun sciencaj kaj teknikaj laborantoj partoprenantaj en la Ĉina Esperanta Labor-kunveno.



en universitato. Kaj multaj el ili daŭrigas tian lernadon en laboraj kaj postlaboraj horoj. Tamen nur tre malmultaj el ili povas facile legi sciencajn literaturon en 1-2 fremdaj lingvoj kaj des pli malmultaj povas traduki kaj verki per ili, aŭ libere interparoli kun fremdlandanoj. Tio multe malhelpas nian landon en la vasta scienca interŝanĝo kun aliaj landoj.

Ĝuste kiel la Dua Internacia Konferenco pri Lingvaj Problemoj en Scienco montris, la lingva baro malhelpas internacian sciencajn interŝanĝojn. Serĉi efikan metodon por forigi tiun lingvan baron en sciencoj jam fariĝis urĝa bezono por diverslandaj sciencaj laborantoj.

Ideala solvo de tiu problemo povas esti neŭtrala internacia lingvo, kiu devas aparteni al neniu lando aŭ nacio kaj esti akceptebla por plej multaj landoj kaj popoloj. Ĝi devas esti facile komprenebla kaj lernebla, havi rigoran sciencecon, logikecon kaj elastecon kaj povas plene esprimi komunajn pensojn de la homaro kaj esti uzata por

la sciencajn kaj kulturajn interŝanĝojn. Krome ĝi povas esti uzata kiel modela lingvoinstrua instrumento kaj ponto por lerni naciajn lingvojn. Dank' al ĝi lernado de naciaj lingvoj fariĝos multe pli facila, kio ebligos al ĝi ĉerpi utilan parton el naciaj lingvoj kaj akcelos la naciajn lingvojn unuiĝi en komunan lingvon.

Kiu lingvo povas servi kiel tia internacia lingvo? Laŭ mia opinio, Esperanto estas la plej taŭga por tio.

Ekde kiam Zamenhof kreis Esperanton, ĝi travivis pli ol 90 jarojn da provado kaj praktika uzado kaj estis rekonata de la tuta mondo kiel vivoplena internacia lingvo. Ĉar ĝi estas neŭtrala, ĝi kaŭzas al neniu nacio lingvan diskriminacion. Ĝi estas facile komprenebla kaj havas altan sciencecon kaj riĉajn esprimojn. Ĝia vasta populareco montriĝas en tio, ke diverslandaj popoloj povas libere disvolvi ĝin en ĝia uzado, kaj troviĝas organizoj internaciaj kaj diverslandaj speciale por disvastigi ĝin. Ĉiuj, kiuj ne ha-

vas antaŭjuĝon kontraŭ Esperanto kaj ne persistas en la establita intereso de grandnaciaj lingvoj, povas vidi, ke disvastigo de Esperanto en la tuta mondo, precipe en sciencoj, alportos grandan utilon al la homaro. Efektive nun parto de sciencaj laborantoj kaj specialistoj jam publikigis siajn esplorajn atingojn en Esperanto aŭ faris sciencajn kaj teknikajn interŝanĝojn per ĝi kaj akiris certan sukceson. Tio pruvis, ke Esperanto vere povas ludi rolon de internacia lingvo.

En esplorado de komputera traktado pri hanlingva informadiko mi vidis, ke Esperanto povas esti ideala interlingvo en komputera tradukado de la scienca literaturo. Antaŭlonge oni jam prezentis tian ideon pri maŝina tradukado per interlingvo. Tamen iuj provis krei tute novan signan lingvon, por ke ĝi ludu tiun rolon. Tiu ideo eble ne estas reala, ĉar la lingvoj de la homaro estas tiel riĉaj, ke ili ne povas esti esprimataj per aliaj signoj. Laŭ mia opinio, estas neniuj aliaj lingvoj pli taŭga ol Esperanto por ludi la rolon de interlingvo en tradukado de naciaj lingvoj. Pro sia scienceco, logikeco kaj reguleco Esperanto estas plej taŭga por esti traktata en komputero kaj uzata por fari komparan analizon kaj mekanikan interŝanĝon kun diversaj naciaj lingvoj. Se oni volas traduki ĉinan tekston en aliajn lingvojn kun Esperanto kiel interlingvo, oni devas unue traduki ĉinan tekston en Esperanton kaj poste el Esperanto en aliajn lingvojn. Same alilingvaj tekstoj povas esti tradukitaj en la ĉinan lingvon tra Esperanto. Tiamaniere oni bezonas uzi nur unu lingvon

Esperanton en la tradukado kiel de la ĉina lingvo, tiel de aliaj lingvoj. Tio ne nur ebligas ĝustatempe traduki grandan kvanton da scienca literaturo kaj povas akceli sciencan kaj kulturalan interŝanĝojn inter diversaj landoj, sed ankaŭ povas ŝpari multajn homajn kaj materiajn fortojn. Tial Esperanto ebligos pli fruan realiĝon de tradukado de la scienca literaturo per komputero. Tio estas ideo de mi, scienca laboranto kaj esperantisto. Mi esperas, ke ĝi konformas al la realo. Kompreneble, realiĝo de tiu ideo dependas de kunlaboro de diverslandaj amikoj de sciencaj rondoj kaj esperantistoj. Ni en Ĉinio povas esplori speciale tradukadon inter Esperanto kaj nia propra nacia lingvo.

Nun nombro da landoj faris multajn eksperimentojn, kiuj pruvis, ke lerni unue Esperanton kaj poste aliajn okcidentajn naciajn lingvojn ne nur ne malhelpas lernadon de la lastaj sed, kontraŭe, helpas ĝin. Por ni ĉinoj lernado de Esperanto estas multe pli facila ol tiu de aliaj okcidentaj lingvoj pro tio, ke Esperanto havas, krom siaj propraj superecoj, ankaŭ multajn similaĵojn kun la ĉina lingvo.

Tial lerni unue Esperanton kaj poste aliajn fremdajn lingvojn estas mallonga vojo por la ĉinoj en ilia lernado de fremdaj lingvoj. Sendube tio taŭgas eĉ pli multe por eŭropanoj.

El miaj argumentoj oni povas vidi, ke Esperanto estos ideala internacia lingvo en sciencaj kaj kulturaj interŝanĝoj; ĝi havas kompetentecon esti interlingvo en la scienca eksperimento pri komputera tradukado; ĝi estas ponto por lerni aliajn lingvojn en la lingva instruado de diversaj landoj. Ĉio ĉi tio prezentis grandan perspektivon de Esperanto en sciencoj. Kompreneble ni ankoraŭ devas fari multajn esplorojn en tio.

Ni estas plenaj de memfido pri la estonteco. Kun progresado de la homa kulturo kaj disvolviĝo de sciencoj, internacia lingvo fariĝos ĉiam pli urĝe bezonata, kaj la neceso de solvado de la lingva problemo en sciencoj per Esperanto estos rekonata de ĉiam pli multaj homoj. La disvolviĝantaj novaĵoj estas nevenkeblaj. Ni certe vidos, ke la hodiaŭa idealo fariĝos realo morgaŭa.

Sciencoj bezonas Esperanton kaj Esperanto des pli sciencojn!

Internacia kongreso sen interpretistoj


Ilustrita de FANG CHENG



CINAJ KAJ SVISA ESPERANTISTOJ EN KUNSIDO

Vespere de la 25-a de oktobro, 1979, esperantistoj de Beijing (Pe-

kino) intervidiĝis kun s-ro Arthur Baur, esperantisto kaj membro de la Delegacio de Svisaj Ĵurnalistoj, dum lia vizitado al Beijing. Li parolas Esperanton flue kaj estas Esperanta parolisto de la Svisa Kurt-onda Stacio. En la kunsido li detale rakontis al la ĉinaj amikoj la historion kaj la nunan staton de la svisa Esperanto-movado.



S-ro Arthur Baur interparolas kun ĉinaj esperantistoj.

ESPERANTISTOJ DE LA SHANGHAI-A NORMALA UNIVERSITATO OKAZIGIS KUNVENON

La 9-an de oktobro, 1979, esperantistoj de la nomita universitato okazigis kunvenon. Ili diskutadis pri instruado de Esperanto en la lernejo, traduka laboro kaj fondo de Esperanto-grupo. La kunvenon prezidis veterana esperantisto Wang Yapu, vicdirektoro de la universitato. Ĝin ĉeestis famkonataj esperantistoj Xu Zhen-e (S. J. Zee) kaj

Pandiŝo. La kunveno faris jenajn proponojn al la universitato:

1. Instrui Esperanton al lernantoj ĉefe de la fremdlingva kaj ankaŭ de aliaj fakultatoj, kaj funkciigi Esperantan kurson por la fakultato de la ĉina lingvo de post la someraj ferioj de 1980;
2. Kompili kaj traduki ĉinajn klasikajn poemojn de diversaj dinastioj, ĉefe sub la direktado de Xu Zhen-e; kaj
3. Kompili Esperantajn lernolibrojn por altlernejoj ĉefe sub la direktado de Pandiŝo.

ESPERANTO SUR LA STEPO DE INTERNA MONGOLIO


Lastatempe ĝojiga informo venis al ni de la stepo de Interna Mongolio ĉe la norda landlimo de Ĉinio. Inspirite de la Ĉina Esperanta Labor-kunveno okazigita en 1979, esperantistoj en ĝia ĉefurbo Huhhot okazigis kunsidon kaj interŝanĝis opiniojn pri la fondiĝo de Esperanto-Ligo de Interna Mongolio kaj disvastigo de Esperanto en la regiono. La kunsidon ĉeestis Yang Lingde kaj Wang Zaitian, veteranaj esperantistoj kaj vicprezidantoj de la Popola Politika Interkonsiliĝa Konferenco de Interna Mongolio, Xiang Quanshen, esperantisto kaj vicdirektoro de la Medicina Kolegio de Interna Mongolio k.a.

Krome, Zhang Naijun, instruisto de la Normala Kolegio de Interna Mongolio, faris raporton kun la titolo "Historio kaj Nuna Stato de Esperanto" en simpozio okazigita de la kolegio kaj ĝi ricevis bonvenon. Okaze de la fondiĝo de la Asocio de Teknika kaj Scienca Fremdlingva Tradukado de Huhhot li raportis al la ĉeestantaro pri la Ĉina Esperanta Labor-kunveno. En la 25-a de oktobro, 1979, li publikigis sian artikolon "Iom Lernu Esperanton" en la tagjurnalo "Interna Mongolio", kiu ludos aktivan rolon en disvastigo de Esperanto en la regiono loĝata ĉefe de mongoloj.

ESPERANTO-KURSO EN TIANJIN

En la 8-a de oktobro, 1979, en la urbo Tianjin (Tiangin) okazis la inaŭguro de Esperanto-kurso kun pli ol 60 kursanoj en la Dagulu-a Mezlernejo. Ĝin ĉeestis esperantisto kaj verkisto Laorong, poeto Armand Su kaj veterana esperantisto Wu Huo. Ĵurnalistoj de la urba radiostacio intervjuis ĝin kaj disaŭdigis la novaĵon.

La lernantoj de la Unua Kurso de Esperanto de Tianjin



LA 2-A PACIFIKA KONGRESO DE ESPERANTO

De la 26-a ĝis 29-a de julio, 1980, okazos la nomita kongreso en la urbo Vancouver, Kanado.

Pri ĝia aranĝo kaj anonco oni povas sin turni al jena adreso:

Al la Sekretario


2-a Pacifika Kongreso de Esperanto

273 Guilby Street,

Coquitlam, B. C.

V3K 3Y5

Kanado



Parto de la urbo Vancouver

LA JUS NASKITA GRUPO EN SRILANKO

Antaŭ nelonge fondiĝis en Srilanko Esperanto-grupo gvidata de s-ro D. B. Jesudason. Ĝi estas nura tiuspeca grupo en la lando. Kvan-kam la grupanoj estas malmultaj, tamen ili estas plenaj je entuziasmo por la Internacia Lingvo. Ĉirkaŭ la fino de la jaro 1978 s-ino Eichholz vizitis la landon kaj tie instruis Esperanton. Dank' al ŝia sindonema laboro kaj lerta instruado pluraj personoj povis lerni nian lingvon en tre mallonga tempo. Ili kompreneble ĝojus ricevi Esperantajn legajojn, ĉar ili komencis kun preskaŭ nenio, kaj pro la malforteco de la valuto de Srilanko estas multekoste por ili aĉeti Esperantajn. La adreso estas jena: S-ro D. B. Jesudason, 71 Pagoda Road, Nugegoda, Srilanko.



ESPERANTO-INSTRUADO EN LA LERNEJO "FALLIERES"

Esperanto-kurso funkcias en la lernejo "Fallieres" en Henin Beau mont, urbo de norda Francio. Ĝin vizitis 32 (plej aĝaj) el 200 geknaboj 6-13-jaraj. Oni donas ĉiusemajne unu-horan lecionon en klasĉambro de la lernejo. La kurso estas gvidata de s-ro Lefebvre Robert. La foto montras, ke la geknaboj tenas ricevitajn numerojn de El Popola Ĉinio.

UEA LANĈAS NOVAN INTERNACIAN KURSON

Unu el la plej interesaj temoj, kiujn oni pridiskutis en Lucerno dum la kunsidoj de la Konsulta Komisiono pri Edukado, estis internaciaj korespondaj kursoj de Esperanto. Jam post kelkaj monatoj Pola Esperanto-Asocio funkciigos

tian kurson, destinitan por personoj, kiuj ellernis fundamentajn regulojn de la Esperanto-gramatiko kaj jam konas la bazan vortprovizon, sed ankoraŭ ne havas sperton pri la uzado de la lingvo. Kaj ĝuste la ĉefcelo de la kurso estas instrui tipajn frazostukturojn, parolturnojn kaj esprimojn, kiujn oni kutime bezonas en la ĉiutagaj kontaktoj. Oni antaŭvidas en 1980 en Pollando internacian renkontiĝon de korespondaj kursanoj, ligitan kun intensa paroliga kurso laŭ programo jam aprobita de UEA.

LA 66-A KONGRESO DE JAPANAJ ESPERANTISTOJ

La 11-an kaj la 12-an de aŭgusto, 1979, okazis la nomita kongreso en la havenurbo Kobe. Ĝin ĉeestis 600 esperantistoj, inkluzive de 22 gastoj el 12 landoj. S-ro Liu Xing kaj s-ino Liu Xiaolan (loĝantaj en Ĉinio), la gefiloj de la forpasinta japana esperantistino kaj batalantino por la amikeco inter la ĉina kaj japana popoloj Verda Majo, partoprenis en la kongreso laŭ invito.

Geknaboj de la lernejo "Fallieres" montras ricevitajn numerojn de EPĈ.

En septembro kaj oktobro, 1979, esperantistoj de la nomita urbo dufoje okazigis kunvenojn kaj diskutadis pri la refondiĝo de Esperanto-grupo kaj funkciigo de Esperanta kurso. Ĝin ĉeestis vicprofesoro Lu Moye de la fakultato de la ĉina lingvo de la Hangzhou-a Universitato kaj alia veterana esperantisto Wang Weizhi. La ĉeestantoj unuanime opiniis, ke disvolvi Esperantajn aktivadojn en tiu famkonata turisma urbo havas apartan gravecon. Ili decidis nepre vigligi ĝin en la urbo.

LA 66-A UK EN PREPARADO

La preparlaboroj por la 66-a UK en Brazilo, en 1981, jam bone progresas. Kunlaboras ĉiuj brazilaj Esperanto-organizajoj. La alta protektanto de la kongreso fariĝis João Batista Figueireda; prezidanto de LKK — la federacia senatano, José Lins de Albuquerque, esperantisto. Menciindas ankaŭ, ke la Ministro pri Socia Komunikado, Said Farhat, parolas Esperanton.

AŬSTRIA PARLAMENTANO POR ESPERANTO KIEL EŬROPA LINGVO

D-ro J. Maderna, deputito de la Nacia Konsilantaro de la Respubliko Aŭstrio, skribis al la Aŭstria Esperantista Federacio sian opinion, ke ĉiuj streĉoj pri unuigado de Eŭropo fiaskos pro la multlingveco en Eŭropo. Pro tio li rekomendas la akcepton de la neŭtrala lingvo Esperanto fare de la Eŭropa Konsilantaro en Strasburgo kun la insista konsilo al ĉiuj eŭropaj registaroj, enkonduki la instruon de Esperanto kiel unua fremdlingvo. La Estraro de AEF estas en kontakto kun s-ro Maderna kaj kunagos kun li en tiu grava afero.

Pri la Perspektivo de Energio en la Mondo

de XU SHOUBO*

LA naturaj fontoj de energio en la mondo povas esti dividitaj en du partojn, t.e. regenera energio kaj neregenera energio. Al la antaŭa apartenas suna, akva, venta, mara, vegetbrulaĵa kaj tajda energioj, kiuj ĉiujare povas regeneriĝi tra natura cirkulo. Tial ili formas la neelĉerpeblan fonton de energio por la homaro. Dum la karbo, petrolo, natura gaso, olea skisto kaj nukleaj brulaĵoj, ekz. uranio kaj torio, apartenas al la lasta speco de energio, t.e. la neregenera energio, kies konservo estas elĉerpebla. Ili ĉiam pli malmultiĝas kun tempopaso. Tial certe venos la tempo de elĉerpiĝo de tiuspeca energio.

Nuntempe, la de ni uzataj energioj ĉefe konsistas el neregeneraj energioj, ekz. petrolo, natura gaso, karbo kaj atomenergio, kiuj konsistigas ĉ. 90% el la totala konsumo de energio; kaj la regenera, ekz. akvopovo, veget-brulaĵo k.a., konsistigas nur ĉ. 10%.

Petrolo estas la plej vaste uzata materialo de energio, kiu konsistigas ĉ. 46% de la totala konsumita kvanto. Nun la mon-

do konsumas tri miliardojn da tunoj da petrolo ĉiujare. La pli ol duono de la energia konsumita kvanto en Japanio, Francio kaj aliaj dependas de petrolo. La konstatita kaj ekspluatebla konservo de petrolo en la tuta mondo estas 143.1 miliardoj da tunoj, el kiuj 52.1 miliardoj da tunoj estis jam ekspluatitaj. Nun restas nur 91 miliardoj da tunoj. 60% de ili troviĝas en Mez-Oriento; en Eŭropo troviĝas 16% de la monda konservo; en Ameriko — 12%; en Afriko — 9%; kaj nur la plej malgranda parto el la konservo estas en la pacifika regiono de Azio, nome 3%.

En la 70-aj jaroj, kun la ekonomia disvolviĝo de diversaj landoj, la petrola konservo ne povas kontentigi la ĉiam pliiĝantajn bezonojn. Precipe post la petrola krizo kaŭzita de la Mez-Orienta Milito en la fino de 1973, oni rimarkis ke la nuna petrola konservo en la tuta mondo sufiĉos por eksplu-

* Vicprezidanto de la Beijing-a Instituto de Energia Fonto kaj vicesploranto

atado de nur pli ol 30 jaroj, se oni ĉiujare ekspluatos tiom da petrolo, kiom en tiu jaro. Multaj specialistoj eĉ diris ke la dua petrola krizo aperos ĉirkaŭ 1985 pro nesufiĉa provizado de petrolo. La unua petrola krizo jam donis pezan baton al la landoj dependaj de importado de petrolo. La manko de petrolo en la mondskalo ne nur malutilis al la ekonomia disvolviĝo de multaj landoj, sed ankaŭ skuis politikan stabilecon de iuj landoj. Tial oni alprenis serion da rimedoj: starigi specialan organon por administri energion, akceli prospektoradon kaj ekspluatadon de petrolo precipe ĉe kontinenta breto, serĉi aliajn energiajn fontojn, klopodi por ŝpari energion, fortigi ĝian sciencteknikan esploradon ktp.

Natura gaso povas bone anstataŭi petrolon kaj havas pli grandan superecon ol karbo en uzado. Post likviĝo ĝi estas taŭga por longdistanca transporto. En la tuta mondo la konstatita kaj ekspluata konservo de natura gaso estas 95,000 miliardoj da kubmetroj, inter kiuj 24,000 miliardoj estas jam ekspluatitaj. En 1977 la mondo foruzis 1,370 miliardojn da kubmetroj da natura gaso. La ekspluatado de

natura gaso povas, laŭ la nuna rapideco, daŭri 48 jarojn.

Karbo estas ordinara energia fonto kun longa historio. Krom en koaksigado, en aliaj uzoj ĝi estas malpli supera ol petrolo kaj natura gaso. Ĝi estas nek oportuna, nek ekonomia en la ekspluatado, transporto kaj uzado, kaj estigis seriozan polucion. Pro tio ĝi fariĝis ne tiel agrabla depost trovo de petrolo kaj gaso, sekve ĝia ekspluatado pli kaj pli malrapidiĝis. Post proksimume 2-jarcenta ekspluatado, la konstatita netuŝita konservo de karbo ankoraŭ superis 1,300 miliardojn da tunoj, inter kiuj pli ol 700 miliardoj da tunoj, t.e. 2.5-oblo de la totala konservo de petrolo kaj natura gaso, estas ekonomie ekspluatablaj. La ekspluatado de karbo povas, laŭ la nuna rapideco, daŭri pli ol 230 jarojn. Tial ĝi ja fariĝas la plej aktuala materialo por anstataŭi petrolon pro sia abunda konservo.


Uranio kaj torio estas energia fonto por atomenergia centralo. Hodiaŭ ilia konstatita kaj ekspluata konservo nombras 1,300,000 tunojn, egale al la karbo-konservo en la tuta mondo. La konservo de uranio kaj torio troviĝas ĉefe en Usono, la Suda


Afriko, Kanado, Aŭstralio kaj Brazilo. Pro sia abunda konservo ankaŭ la atomenergia fariĝas la plej aktuala energia fonto por anstataŭi petrolon samkiel karbo. Nun 20 landoj jam konstruis atomenergiajn centralojn, kun totala kapacito de ĉ. 100 milionoj da kilovattoj.

La akvo-energio estis plej frue utiligata de la homoj. Tamen ĝia konservo estas limita en la mondo. Laŭ la meznombra flukvanto ĝi ĉiujare povas produkti nur 9,800 miliardojn da kilovatt-horoj, inter kiuj nur 4,400 miliardoj da kilovatt-horoj estas utiligeblaj, kies energia povo egalas 540 milionojn da tunoj da norma karbo, t.e. ĉ. 5% de la konsumita kvanto de energio en la mondo. Kun la pliiĝo de tiu kvanto la proporcio de akvo-energio pli kaj pli malgrandiĝos. Japanio, Eŭropo, Usono kaj aliaj landoj evoluintaj en industrio jam utiligas ĉiujn ekonomie utiligeblajn akvajn energiojn, t.e. 30% — 60% de akvo-energio. En la disvolviĝantaj landoj malpli ol 5% de la akvo-energio estis utiligataj, ĝi do povos ludi pli grandan rolon en tiuj landoj.


Ankaŭ la planto-brulaĵoj kiaj lignoj, tigoj de plantoj kaj aliaj estas plej frue uzataj de la homaro kiel materialo de energio. Ĉar ili povas esti utiligataj kiel materialo kaj sterko, en la industrie evoluintaj landoj ili estas anstataŭigitaj iom post iom per bruligebla minajo. En kamparo de la subevoluintaj landoj oni ankoraŭ uzas ilin kiel ĉefajn hejtajojn. Laŭ statistiko, la vegetaĵoj estigitaj de fotosintezo en la tuta mondo ĉiujare estas 162 miliardoj da tunoj, kiuj egalas 115 miliardojn da tunoj de norma karbo. Sed tiuj vegetaĵoj nun servas ĉefe kiel furaĝo,

La baraĵo de la Hidroelektrejo "Fera Pordo" de Jugoslavio





Novtipa aparato de termo-nuklea reakcio de Usono



Nuklea elektrejo de Kanado

sterko por agrikulturo kaj materialoj por industrio, kaj nur malpli ol 1% estas uzata kiel hejtajo. Por liberigi la mondon el energia krizo, iuj specialistoj proponis, ke oni kultivu vegetaĵojn por energio, kiaj rapide kreskantaj arboj kaj algoj kiuj povas anstataŭi petrolon post kiam ili estas prilaboritaj en alkoholon, metanolon kaj metanan gason.

Krom la supre menciitaj specoj de energio multe uzataj, troviĝas ankoraŭ novaj fontoj de energio:

Olea skisto kaj olea sablo: Ili konstatita konservo utiligebla povas produkti 460 miliardojn da tunoj da oleo, kiuj egalas 700 miliardojn da tunoj da norma karbo.

La sunenergio, ricevita de la terglobo, portas varmon de 610×10^{12} milionoj da grandaj kalarioroj, kiuj egalas 87,000 miliardojn da tunoj da norma karbo, kies 0.01% jam povas plenumi la bezonon de la tuta mondo.

En ĉiu jaro la movforto de vento, ondo kaj marfluo en la tuta mondo sume havas ener-

gion de 3,240,000 miliardoj da kilovatt-horoj, kiuj egalas 398 miliardojn da tunoj da norma karbo.

La tervarmo jam konstatita kaj ekonomie utiligebla en la mondo ĉiujare povas produkti 525.6 miliardojn da kilovatt-horoj, kiuj egalas 64 milionojn da tunoj da norma karbo.


Tajda energio en la tuta mondo ĉiujare estas sume 26,000 miliardoj da kilovatt-horoj, inter kiuj 560 miliardoj da kilovatt-horoj estas utiligeblaj, ili egalas 69 milionojn da tunoj da norma karbo.

Deŭterono por nuklea kunfandiĝo: La marakvo de la mondo entenas deŭteronon je 44,000 miliardoj da tunoj, kiuj egalas 528,000,000,000 miliardojn da tunoj da norma karbo kaj povas esti uzataj je ĉ. 60 miliardoj da jaroj laŭ la nuna konsumo rapideco de energio.

La supre menciitaj materialoj montris, ke sen plia malkovro de grandaj olekampoj kaj gaskampoj, post 30-40 jaroj estos elĉerpitaj la konservoj de petrolo kaj natura gaso. Tiam ni

povos dependi nur de karbo, parto de oleaj skisto kaj sablo, kaj la konservo de atoma energio — uranio kaj torio. Se la tiama mondo ĉiujare konsumos energion egalantan 20-30 miliardojn da tunoj da norma karbo, ankaŭ ili do estos elĉerpitaj en ĉ. 50 jaroj. Koncerne la ceterajn fontojn de energio, kiaj tiuj de akvo, vegetaĵo, vento, maro, tervarmo, tajdo k.a., ĉiuj iliaj konservoj estas limitaj. La senlimaj estas nur la suna energio kaj deŭterono, la energio por termonuklea reakcio. La suna energio konsistigas preskaŭ 100% de la regeneraj energioj kaj la deŭterono preskaŭ 100% de la konservoj de neregeneraj energioj. Tial la suna energio kaj deŭterono estas potenca kaj nelĉerpebla energia fonto por la homaro. Nun oni jam antaŭdiris ke ekde la lasta duono de la venonta jarcento ili ludos ĉefan rolon en la energiaj fontoj de la mondo, anstataŭ la ceteraj. Tial multaj landoj en la hodiaŭa mondo donas grandan atenton al esploro kaj studo pri novaj energiaj fontoj, precipe pri la sunenergio kaj atomenergio por termonuklea reakcio.

lom pri la Riĉfontoj de Energio en Ĉinio



*Sunenergia veldmaŝino fabrikita de
Hai'an-gubernio, Jiangsu-provinco*

ĈINIO havas areon de 9,600,000 kvadrataj kilometroj. Sub ĝia vasta tero kaj marfundo troviĝas abundaj riĉfontoj de energio.

Kiel ĉiuj scias, Ĉinio havas grandan konservon de karbo. La konstatita konservo jam atingis 600 miliardojn da tunoj. La karbo havas kompletan specaron kaj bonan kvaliton. Precipe la koaksa karbo, bezonata de la metalurgia industrio, konsistigas grandan elcenton. Ankaŭ la fontoj de petrolo en Ĉinio estas rimarkinde abundaj. Sinsekve en la sedimentaj basenoj de Qaidam, Songliao, Jianghan, Sichuan kaj Jizhong, kun totala areo de pli ol 1,000,000 kvadrataj kilometroj, oni trovis pli ol 1,400 petrolajn strukturojn, kiuj pretigis multajn gravajn bazojn por ekspluato. Ankaŭ multe progresis la geologia laboro pri mara petrolkonservo sur la kontinentaj bretoj de la malprofundaj Bohai-mar, Orienta Ĉina Maro kaj Suda Ĉina Maro. Krom Changjiang (Jangzi)-rivero kaj Huanghe-rivero (la Flava Rivero), Ĉinio

havas pli ol 1,200 riverojn, el kiuj ĉiu havas basenon de pli ol 1,000 kvadrataj kilometroj. La kapacito de hidroenergio proksimumas 580 milionojn da kilovattoj. Kaj cetere troviĝas giganta kvanto da natura gaso.

Post la fondiĝo de la nova Ĉinio la registaro tre atentis laŭplanajn ekspluaton kaj utiligon de la riĉfontoj. En la lastaj jaroj la registaro refoje faris alvokon por plifortigi la hejtajn industrion kaj elvolvi la latentajn fortojn de la riĉfontoj de energio por ilin servi al la modernigo de nia lando.

PLI MULTE DA KARBO AL INDUSTRIO

Ĉinio estas lando plej frue ekuzinta karbon. Tamen la karboproduktado disvolviĝis tre malrapide en la duonfeŭda kaj duonkolonia malnova Ĉinio. Post la Liberiĝo la popola registaro plirapidigis la disvolvon de la karba industrio. En la 30 jaroj post la fondiĝo de la popola respubliko, 1,492 ŝaktoj estis konstruitaj. Interalie 12

minejoj donas po 10,000,000 tunojn da karbo jare. En 1978 la jara produktokvanto de karbo superis 600 milionojn da tunoj, kaj tiel nia lando leviĝis de la deka ĝis la tria loko en la mondo, rilate la karbon produktokvanton.

Tamen la nuna disvolviĝo de la karba produkto ankoraŭ ne povas konformi al la bezono de efektiviĝo de la moderniga konstruado. Sekve oni koncentras siajn fortojn por konstrui ok grandajn karbobazojn, kies jara produktokvanto superos respektive 10,000,000 tunojn. Laŭ konjekto, la karbokonservo en tiuj ok bazoj superis 120 miliardojn da tunoj. Oni plirapidigas la konstruon de sep ŝaktoparoj en la karbobazoj Huainan kaj Huaibei en orienta Ĉinio. Ilia totala produktopovo planita estas 14,100,000 tunoj, kaj tri paroj el ili ekproduktos en la kuranta aŭ venonta jaro. Oni planis ekspluati la karbobazon Huolinhe sur la stepo Horqin en la Aŭtonoma Regiono de Interna Mongolio, unu el la plej

grandaj subĉielaj karbominejoj de Ĉinio. Ĝia projektita produktopovo estas 20,000,000 tunoj. Nun pli ol 10,000 laboristoj kaj teknikistoj konstruas tie akcesorajn instalaĵojn, kaj ankaŭ la Fervoja Ministerio konstruas fervojon longan je 400 kilometroj, de la urbo Tongliao ĝis la karbobazo.

Ĉinio havas abundajn riĉfontojn de karbo, kaj la ŝtato difinis karbon kiel la ĉefan utiligatan energifonton. Kaj sekve dum la reguligo de la nacia ekonomio oni klopodas por ĉerpi la latentajn fortojn kaj fari renovigojn kaj reformojn al la karbominejoj, kaj samtempe paŝon post paŝo larĝigas la skalon kaj plirapidigas la paŝojn de la fundamenta konstruado de la karba industrio. Komencis produkti 16 el la pli ol 100 karboŝaktoj, kiuj estis konstruataj en la pasinta jaro. Nun Ĉinio penas mem fabrikii maŝinojn kaj ankaŭ importas karbominejajn maŝinojn, teknikon kaj sciencajn administrajn metodojn por ŝanĝi sian malmodernan meĥanisman kaj laŭpaŝe levi la karbominejojn al la moderna nivelo.

NOVA FIZIONOMIO DE LA PETROLA INDUSTRIO

Post kompletigo de la petroltubaro inter Daqing-olekampo kaj la urbo Qinhuangdao, oni finkonstruis alian petroltubaron, kiu interligis Shengli-olekampon de Shandong (Ŝandong)-provinco kun la urbo Nanjing (Nankino), la ĉefa transiga haveno ĉe bordo de Changjiang-rivero. Ĝi estas unu el la gravaj partoj de la petroltubaroj konstruotaj de nia lando.

Antaŭ la Liberigo la petrola industrio de Ĉinio estis tre


postiginta. La totala produktokvanto de nafto dum la 45 jaroj de post la ekspluato de la unua olekampo ĝis la jaro 1948 estis nur du milionoj da tunoj kun iom pli. Tiam la ĉina petrola merkato estis monopoligata de fremda kapitalo, kaj Ĉinio ĉefe uzis "fremdlandan petrolon". Sed dek jarojn post la fondiĝo de la nova Ĉinio, direktate de la geologia teorio kreita de la eminenta geologo Li Siguang, oni trovis kaj ekspluatis la faman altproduktan Daqing-olekampon en nordorienta Ĉinio. Pli poste oni trovis sinsekve Shengli- kaj Huabei-olekampojn kaj aliajn olekampojn, kaj tio komplete neis la diron de iuj fremdaj special-

istoj ke "al Ĉinio mankas petrolo".


La konstruata petrolbazo Hua-bei inkluzivas Dagang-olekampon ĉe la orienta marbordo, Renqiu-olekampon en la Ebenaĵo de Centra Hebei (Hebej) kaj la petrolan prospektorejon en la suda antaŭurbo de Beijing (Pekino). Tiu petrolbazo havis oleputojn kun totala longeco de 1,300,000 metroj, boritajn en la jaro 1978, produktis 20,230,000 tunojn da nafto kaj liveris 700,220,000 kubmetrojn da natura gaso.

Antaŭ nelonge venis ĝojiga informo ke komencis produkti Nanyang-olekampo en Henan-provinco de centra Ĉinio. Ĝi

Nove konstruita naturgasa kemia fabriko apud Chishui-rivero, Guizhou-provinco



Paro da ŝaktoj nove konstruitaj en Datong-karbominejo, unu el la grandaj karbobazoj de Ĉinio




estas altprodukta olekampo rapide konstruita en 1977. Nun ĝi havas centojn da produktaj putoj kaj akvoenigaj putoj. Tie la laboristoj alprenis la metodojn de Daqing-olekampo "enigi akvon en frua tempo" kaj "enigi akvon laŭ tavoloj", kaj la efikeco de ilia laŭtavola akvoenigado jam atingis la avangardan nivelon. Laŭ raporto, la plej alta geologia konservo de oleo en ĉiu kvadrata kilometro en tiu olekampo superis 4 milionojn da tunoj, kaj la plej granda efika dikeco de oletavolo de la oleputoj superis pli ol 100 metrojn.

Krome, antaŭ nelonge estis borita altprodukta oleputo en la "Baseno ĉe la Enfluejo de Zhujiang-rivero" en la Suda Ĉina Maro. Oleo ŝprucis el marfundo profunda je pli ol 2,000 metroj.

La totala areo de la baseno sur la kontinenta breto estas 150,000 kvadrataj kilometroj, kaj la plej granda dikeco de sedimenta tavolo estas pli ol 6,000 metroj. La baseno, kiel kaldrono, kuŝas en la vasta maro pli ol 200 kilometrojn for de la enfluejo de Zhujiang-rivero de Guangdong-provinco. La sukcesa prospektorado de tiu olebaseno kun granda perspektivo estas grava trovo en la geologia historio de Ĉinio.

Dank' al ekspluatado de la olekampoj, la jara produktokvanto de nafto de Ĉinio rapide superis 100 milionojn da tunoj. Kaj ĝi leviĝis de la 29-a ĝis la 8-a loko en la mondo rilate oleprodukton, tiel Ĉinio fariĝis unu el la gravaj oleproduktaj landoj kaj starigis sendependan, relative kompletan sistemon de petrola industrio inkluzive prospektoradon, eltiradon, distribu-

Tervarmo utiligata por fiŝbredado en Yingshan-gubernio, Hubei-provinco



adon kaj rafinado de oleo. Nun la petrol-rafinejoj de Ĉinio ĉiujare rafinas multe da bonkvalitaj benzino, keroseno, mazuto, lubrikoleo k. a., kiuj formas pli ol 640 specojn. Ili estas liverataj al la industriaj, agrikulturaj kaj nacidefendaj departementoj. Kaj krome certa kvanto da tiaj produktajoj estas eksportataj alilanden.

POR ELEKTRO

En la lastaj 30 jaroj la nova Ĉinio havis relative rapidan progreson en sia elektra industrio. Nun la totalaj kapacitoj de la generatoroj de Ĉinio atingis 52,770,000 kilovattojn, nome 20-oblon de tiu antaŭ la Liberiĝo, kaj ĝia produktokvanto de elektra energio leviĝis de la 25-a ĝis la 7-a loko en la mondo. Ĉinio jam konstruis sur Huanghe-rivero la grandajn hidroelektrejojn Liujiaxia, Qingtongxia kaj Yanguoxia, kaj nun konstruas sur la meza parto de Changjiang la grandan hidroelektrejon Gezhouba. En la vasta kamparo troviĝas pli ol 80,000 malgrandaj hidroelektrejoj, kiuj provizas la montvilaĝojn per elektroenergio.

Tamen la elektra industrio de Ĉinio ankoraŭ ne povas adaptiĝi

al la disvolviĝo de la industria kaj agrikultura produktado. Nun la laboristoj de la elektra industrio plirapidigas la entreprenatan konstruadon, plene elvolvas la kapablon de la ekipaĵoj kaj akcelas la hidroelektran konstruadon. Krome ili intensigas la konstruadon de unuecaj karbo-elektraj bazoj, nome elektrejoj tuj ĉe karbominejoj. Kiel ekzemple, la karboregiono de Shanxi (Ŝanxi)-provinco, kiu havas abundajn riĉfontojn de karbo, nun faras la planon konstrui grupon da elektrejoj, kiuj turnos karbon en elektran energion tuj ĉe minejoj kaj transsendos la elektron al grandaj industriaj urboj per 500,000-voltaj altensiaj lineoj. Tio povas multege redukti karban transportadon sur fervojo. Nun estas konstruataj 500,000-voltaj lineoj 610 kilometrojn longaj inter Pingdingshan de Henan-provinco kaj Wuhan de Hubei (Hubej)-provinco.

Krom disvolvi la industriojn de karbo, petrolo kaj elektro per siaj propraj fortoj, Ĉinio kontraktis kaj kontraktos traktatojn kun iuj landoj por plifortigi kunlaboron en energia tekniko. Tio akcelos la ekspluaton kaj utiligon de la riĉfontoj de energio de Ĉinio.

Metano—Nova Hejtajo en Ĉina Kamparo

DUM diversaj landoj ĝenerale sentas malsufiĉon de energio, Ĉinio akiris sukceson en utiligo de metano en la ĉiutaga vivo de kamparanoj kaj agrikultura produktado. Kamparanoj tre ŝatas ĝin uzi.

Metano estas bruligebla gaso akirebla per fermentado de organika materio en hermetikeco. Konstruu basenon nepenetreblan por aero kaj akvo, metu en ĝin fekaĵojn, tigojn, herbojn, arbofoliojn, malpuran akvon k.s., por ke ili fermentu en hermetikeco, kaj produktiĝos metano.

Lastatempe mi vizitis la brigadon Suzhuang en la antaŭurbo de Beijing (Pekino), kiu estas avangarda en utiligo de metano. En la lastaj jaroj, samtempe kun la senĉesa disvolviĝo de agrikultura produktado, tiu brigado konstruis nombron da loĝdomoj por siaj komunumanoj, instalis tubakvan sistemon kaj starigis publikan banejon. Tamen al la komunumanoj mankis hejtajo por kuirado. Precipe printempe 80% de la familioj devis aĉeti karbon aŭ brullignon! Iuj komunumanoj pensis en si: Kiel bone estus, se oni povus kuiri sen bezono de karbo aŭ brulligno! En aprilo de 1977, la brigado Suzhuang komencis konstrui metanajn basenojn, laŭ la sperto de Mianyang-subprovinco de Sichuan (Siĉuan)-provinco. Kaj en la daŭro de pli ol unu jaro ĝi konstruis 91 tiajn basenojn. Preskaŭ ĉiuj

familioj en la brigado uzas metanon en kuirado kaj lumigado.

Tagmeze mi venis en la domon de komunumano Yan Zhaoying. En ŝia kuirejo mi vidis nove konstruitan metanan kuirfornon, kiu estas multe malpli granda ol brika forno hejtata per plantotigoj. La mastrino malfermis la kranon de la forno kaj je froto de alumeto la forno eligis bluan flamon. Post duonhoro la mastrino jam pretigis tri pladojn, unu supon kaj 1.5 kg. da patkukoj. Ŝi diris al mi, ke por tion fari per malnovtipa forno oni bezonas pli ol unu horon.

Yan havas 8-kubmetran metanan basenon subtere, nur kies enirejo kaj elirejo por ĝia enhavo estas surtere. La enirejo lokiĝas inter la necesejo kaj la porkostalo, por ke la fekaĵoj de homoj kaj brutoj mem falu en la basenon. Krome, oni devas meti en ĝin tigojn kaj foliojn kaj certan kvanton da akvo, kaj post fermentado la baseno povas produkti metanon. En la centro de la baseno troviĝas kaŭĉuka tubeto por metano, kondukanta al la forno kaj lampoj. La baseno de Yan povas produkti metanon sufiĉan por kuirado kaj lumigado de trimembra familio.


En junio de 1979, en la kamparo de Ĉinio estis 7,100,000 tiaj basenoj, inter kiuj 1,600,000 estis nove konstruitaj en 1978. Sichuan-provinco kun plej multenombra loĝantaro progresas

tre rapide tiurilate, ĝi konstruis pli ol 5,000,000 basenojn. Ankaŭ la provincoj Jiangsu (Giangsu), Shandong (Ŝandong), Zhejiang (Ĝegiang), Guangdong, Liaoning (Liaŭning) kaj la urbo Shanghai (Ŝanhajo) konstruis multe da tio.

Nia lando komencis utiligi metanon en 1958, sed nur en la lastaj jaroj ĝi estas vaste aplikata.

En la pasinteco, ĉiujare oni ne nur forbruligis en multaj vilaĝoj, kiel en la brigado Suzhuang, grandan kvanton da tigoj, brullignoj, sed ankaŭ uzis multajn laborfortojn por kolekti hejtajojn kaj transporti karbon, kio kaŭzis malŝparon de kamparaj laborfortoj kaj naturaj

Metano uzata por kuirado kaj lumigado en kamparana hejmo



riĉfontoj. La produktado de metano el fekaĵoj povas solvi la problemon de hejtaĵo kaj sterko kaj multe altiĝi la valoron de fekaĵoj kaj tigoj. En bruligo de tigoj oni povas utiligi nur 10-20% de ilia termoenergio; se oni faras el ili metanon, 40-60% de ilia termoenergio povas esti utiligitaj.

Prenante metanon kiel hejtaĵon oni povas plene utiligi la termoenergion de plantoj, kaj ankaŭ ilian organikan materion. Post kiam organikaj kombinaĵoj estis ĵetitaj en fermitan basenon, iliaj postrestaĵoj kaj likvaĵo post fermentado kaj produktado de metano povas fariĝi bona organika sterko. Unu 10-kubmetra baseno ĉiujare povas liveri, krom gaso por kuirado kaj lumigado de 4-5-membra familio, pli ol unu tunon da hum-acida sterko kaj pli ol 20 tunojn da likva sterko. Laŭ analizo, en komparo kun la nefermentinta organika sterko, la amoniaka nitrogeno entenata en metana sterko pliiĝis je 19% kaj la efika fosforo je 31%. La antaŭurbo de Mianyang de Sichuan-provinco ĝenerale uzas metanon jam de 3 jaroj. La tieaj metanaj basenoj produktis 1,000,000 tunojn da hum-acida sterko. En la produktado de greno la metana sterko ludis gravan rolon, kaj la produktokvanto de greno de tiu loko kreskis de 190,000 tunoj en 1975 ĝis 265,000 tunoj en 1978.

Dank' al utiligo de metano multe pliboniĝis la higienaj kondiĉoj en vilaĝoj kaj la sanstato de la komunumanoj. Por akiri metanon, la komunumanoj forportas rubaĵon, malpuran akvon kaj survojan brutan fekaĵon, kaj la stratoj kaj kortoj en la vilaĝoj fariĝis puraj. Pro hermetika fer-

mentado la parazitaj ovoĵoj kaj bakterioj en la fekaĵoj, malpura akvo kaj herboj estis plejparte mortigitaj, muŝoj kaj moskitoj malmultiĝis kaj diversaj mal-sanoj maloftiĝis.

Tuj vilaĝoj de Ĉinio uzas metanon ankaŭ en produktado. En nemalmultaj lokoj oni starigis elektrejojn kaj movfortajn centralojn kun metano kiel hejtaĵo por funkciigi dizelojn, generatorojn, akvopumpilojn kaj maŝinojn por prilabori agrikulturajn kaj flankokupajn produktaĵojn. Per funkciigo de dizeloj por metano miksitaj kun dizeloleo oni povas ŝpari ĉ. 70% de la bezonata dizeloleo.

Nun en la kamparo de Ĉinio estis konstruitaj 150 metano-elektrejoj kaj 560 metano-movfortaj centraloj. La metano-elektrejo de la urbo Foshan de Guangdong-provinco interesis multajn vizitantojn el fremdaj landoj.

Tiu elektrejo posedas du generatorojn kun kapacito de 90 kilovattoj. La metano-produkta baseno sin trovas tuj apud la elektreja domo. Ĝi estas konstruata kun alteco de ĉ. 3 metroj kaj areo de 1,500 kvadrataj metroj. Ĝi estis transformita el baseno por forigo de malutilo de fekaĵoj. Kvankam oni ankoraŭ ne plene utiligis ĝian gason, tamen ĝi jam produktis pli ol 200,000 kilovatt-horojn da elektro.

Ĉinio abundas je materialoj por produkti metanon. Laŭ takso, la fekaĵoj en nia kamparo ĉiujare povas produkti 140,000,000,000 kubmetrojn da metano, kaj la tigoj kaj folioj de agrikulturaj plantoj ĉiujare, krom liveriĝi kiel furaĝo kaj industriaj materialoj, povas produkti pli ol

58,000,000,000 kubmetrojn da metano, se oni metas ilin en metanajn basenojn. Duono de tiuj materialoj jam povas produkti tiom da metano por plenumi la bezonon de ĉiuj kamparaj familioj en kuirado kaj tiun de 225,000-kilovatta metano-elektrejo aŭ metano-movforta centralo. En la estonteco, kun la disvolviĝo de nia agrikultura produktado, plimultiĝos niaj materialoj por produkti metanon.

En junio de la lasta jaro, la ŝtataj Ekonomia Komisiono, Scienca Komisiono, Agrikultura Komisiono kaj la Agrikultura Ministerio kune kunvokis tutlandan laboran kunvenon pri metano. Tiu kunveno ellaboris projekton por disvolvi nian kamparan metanan aferon, aplikis kuraĝigajn rimedojn kaj asignis specialan monsumon por pli vasta apliko de metano kaj decidis fondi kaj plifortigi diversajn instituciojn disvastigantajn metanan teknikon kaj pli fortigi la scienc-esploran laboron pri biologia energio. Kaj krome, la ŝtato starigos fakon de biologia energio en iuj altaj lernejoj por elkulturi nombron da tiaj specialistoj post kelkaj jaroj.

En la lastaj jaroj, registaraj oficistoj kaj specialistoj de dekoj da landoj venis al Ĉinio por esplori utiligon de metano. En aŭgusto pasintjare, Ĉinio okazigis en Chengdu (Ĉengdu), la ĉefurbo de Sichuan-provinco, por la Konsilio de Media Programo de la Unuiĝintaj Nacioj, teknikan kurson de metano, kiun vizitis personoj el 20 landoj. Amikoj el fremdaj landoj laŭdis la ĉinan metanan aferon, dirante ke ĝi estas unu el la efikaj rimedoj por solvi la problemon de energia krizo kaj media polucio.

Ministo Lu Jinshui

Fotoi de LI YONGTAN

Lu Jinshui, maljuna laboristo de Qianqiu-karbo-minejo en Henan-provinco, estas tre energia en sia laboro. Dum pli ol 20 jaroj li neniam malfruis, ĉu en varmegaj ĉu en frostaj tagoj. Li iris en la ŝakton la unua, sed revenis la lasta. Li senĉese kontribuis por pliprodukti karbon kaj per tio akiris la gloran titolon de laborheroo de la ĉina karba industrio.



Lu Jinshui (maldekstre) laboras en ŝakto.


Lu Jinshui




Surmara Petrol- kolektado

En Bohai-golfo de Ĉinio staras pluraj petrol-kolektaj stacioj. Tie diligente laboras la laboristoj de la petrol-kolektaj taĉmentoj. La petrolo eltirita el la marfundo estas transportata al diversaj lokoj de la lando.


La mara petrol-afero de la nova Ĉinio, kvankam komencita antaŭ ne longe, havas tamen grandan perspektivon.




Oleŝipo



Juntado de
olecisterno



Laborhero
Kang Yuyi




Arganistino



En laborista loĝejo



Sur la Putobora Ŝipo "Bohai n-ro 1"



La putobora ŝipo "Bohai n-ro 1"

EKSPLUATO de mara petrolo estas nova industrio de Ĉinio, kiu havas historion de 14 jaroj. En 1966 ni sukcese boris la unuan puton en Bohai-golfo. Kiuj estas la petrolserĉantoj sur la vasta maro kaj kiel ili laboras kaj vivas? Por informiĝi pri tio mi veturis per trenŝipo "Binhai n-ro 216" al la putobora ŝipo "Bohai n-ro 1" en iu junia tago de 1979.

La trenŝipo navigis antaŭen en rapideco de 12 marmejloj en ĉiu horo. En la malproksima horizonto la ĉielo kunfandiĝis kun la maro. Kune kun mi veturis dekkelkaj junaj laboristoj, kiuj revenis post ferioj. Ili ĉiuj havas laŭtan voĉon eble pro la longa vivo sur la maro. Inter tiuj junuloj estas unu malgrasa kaj altstatura knabego kun sunbruna vizaĝo. Li havas nur iom pli ol 20 jarojn kaj komencis labori en 1976, tamen liaj kolegoj nomas lin "majstro Xiao". Li estas parolema kaj humora. Li diris al mi: "Kiam mi unuafoje veturis en maro, mi renkontis fortajn venton kaj ondojn. Ne-

longe post mia surŝipiĝo mi komencis vomu kaj elvomis ĉion el la stomako, kaj mia sufero ja estis neeltenebla." "Ĉu vi ankoraŭ vomas?" demandis mi haste. "Ne, mi jam kutimiĝis vivi sur ŝipo, kaj krome mi havas speranton: Se vi vomas, vi devas tuj preni manĝaĵon, aŭ kuŝiĝi tuj post surŝipiĝo." Alia knabego rapide intermetis: "Starante sur ŝipo vi rigardu foren, kaj ne rigardu maron kun mallevita kapo, ĉar tio pli facile kaŭzas vomon."

Ĉe tio la korpo de "Bohai n-ro 1" jam aperis el la horizonto kaj post veturado de unu kaj duona horoj nia trenŝipo jam estis ĉe la piedo de la putobora ŝipo. Ĝi estas memleva ŝipo projektita kaj fabrikita de nia lando mem. Je la 12-a de marto, 1973, ĝi komencis bori la unuan puton en la maro. La ŝipkorpo havas altecon de pli ol 5 metroj kaj longecon de pli ol 50 metroj. Ĝi, subtenate de kvar ŝtalaj kolonoj, staras 20 metrojn super la marsurfaco. Ĉiu el la 4 ŝtalaj kolonoj alta je pli ol 70 metroj

estas cilindro kun diametro de 2.5 metroj, farita el ŝtalplato kun dikeco de 4 cm., kaj profunde eniĝis en la marfundon. Sur la ŝipo instaligis ŝaktoskafaldo alta je 40 metroj. La tuta putobora ŝipo staras sur la maro kvazaŭ giganto.

Ĝi ja meritas la nomon de "maŝina insulo". La antaŭa parto de la ŝipo kun duetaĝa kajuto, en kiu povas loĝi 110 homoj, estas vivspaco de laboristoj, kie estas manĝejo kaj banejo. En la malantaŭa parto de la ŝipo instaligis ŝaktoskafaldo kaj kotaja baseno. En ĝia meza parto staras unu argano. Estas alia loko, kie amasiĝas diversaj materialoj por bori putojn.

Pli ol cent junaj laboristoj vivas sur tiu "insulo". Ili havas malsamajn karakterojn kaj iam neeviteble aperas inter ili malakordajoj, tamen en laboro ili kunagas solidare kaj bonorde kiel unu tuto.

Foje, "Bohai n-ro 1" pretis translokiĝi. Subite la maro ekmuĝis kaj 8-9-grada ventego

levis ondegojn altajn je kelkaj metroj kaj ĵetis ilin al la ŝipo. 30-tuna kapstano kune kun la ankro estis forportita en la maron, la ŝtala kolono n-ro 1 estis rompita en plurajn pecojn kaj la granda korpo de la ŝipo perdis sian ekvilibron, forte balancante en la ondoj. Ŝip-droniĝo povis okazi en ĉiu momento. Konsiderante pri sekureco de la laboristoj, la gvidantoj de la ŝipo decidis, ke ili ĉiuj transiru sur trenŝipon, sed neniu foriris. Estis necese ĵeti kablون al la trenŝipo, kaj pli ol 20 knabegoj tuj rapidis al la pruo kaj staris brakon en brako formante korpan muron, por ke alia kamarado povu ĵeti la kablون. Ondego alĵetiĝis kaj la knabegoj tuj leviĝis kaj puŝiĝis de la pruo al la pobo. En tiu danĝera situacio iuj laboristoj estis kovrantaj kajutojn sur la ferdekoj kaj aliaj pumpis marakvon el kajutoj. Dank' al ilia streĉa lukto kontraŭ ventego kaj ondegoj dum pli ol du tagoj kaj tri noktoj, la ŝtataj posedaĵoj estis savitaj kaj la ŝipo denove eklaboris.

Foje okazis putoŝpruco. Se ĝi ne estus ĝustatempe ĉesigita,

okazus eventuale incendio, kaj povus ruinigi la puton. Tiam pro alta premo de subtera gaso krevis kontraŭŝpruca kunligilo. Juna laboristo Zheng bone faris juntadon al ĝi malgraŭ natura gaso ĉe la aperturo de la ŝprucanta puto. En sep tagoj kaj sep noktoj de la urĝa savado la laboristoj ĉiam persistis en sia posteno. Gamboj de multaj el ili ŝveliĝis de longa starado, tamen neniu plendis pri tio.


Vivkondiĉoj sur la putobora ŝipo estas malfacilaj. Somere la suno bakas la "feran insulon" kaj vintre frosta vento faras ĝin kvazaŭ fridujo. Ankaŭ la senĉesa bruado de maŝinoj suferigas novulojn. Iutage, mi demandis laboristojn, kiel ili opinias pri la surmara vivo. Unu el ili respondis: "Ni jam alkutimiĝis al tio, sed iam ni sentas enuecon." Li diris la veron. Plejparto de ili venis de grandaj urboj, sed nun longe restadas sur la "soleca insulo", akompanate de la blua ĉielo kaj maro. Tia vivo multe ne konformas al la karaktero de junuloj. Malgraŭ tio, ili ĉiamaniere klopodas por vigligi sian vivon. Ekzemple, post labordeĵoro ili

rigardas televidon kaj ludas kartojn aŭ ŝakon. Ankaŭ filmo-projekcia taĉmento ofte venas por prezenti al ili filmojn. Ili instalas sur la ferdeko paralelon por ekzerci la korpon. Iuj ŝatas legi, aliaj ŝatas sin plezurigi per naĝado en aŭ remado sur la kvieta maro. Oni bredas du birdojn kiuj alportas al ili grandan plezuron per sia belsona pepado.


Mevoj tuttage flugas ĉirkaŭ la putobora ŝipo. Ili estas kunuloj de la laboristoj. Krom tiuj birdoj, ankaŭ aliaj amikoj estas troveblaj sur la vasta maro. Ĉirkaŭ la ŝipo ofte fiŝkaptas ŝipoj venintaj de la provincoj Shandong kaj Hebei. Fiŝistoj ofte gastas sur ilia "insulo". Ili helpas fiŝistojn solvi malfacilojn kaj la lastaj donacas al ili freŝajn markaptitaĵojn. Estis feliĉe ke ankaŭ mi manĝis frandaĵojn el salikokoj ĵus kaptitaj.

En la tagmezo de la tria tago mi adiaŭis la ŝipon "Bohai n-ro 1". Iom post iom malaperis el mia vidkampo tiu granda ŝipo, tamen restis en mia memoro la figuroj de la putoboraj laboristoj.

Laboristoj faras korpajn ekzercojn en postlabora horo.



Por ekbori



Pri la Ŝosea Persontrafiko en Yantai- subprovinco

DE NIA RAPORTISTO

SUR muro de la Yantai-a aŭtostacia domo pendas skiza mapo de la pasaĝero-transportaj linioj kaj stacioj de la Aŭta Transporta Kompanio en Yantai-subprovinco de Shandong-provinco. Sur la mapo la transportaj linioj, kiel folivejnoj, interligas ĉiujn guberniojn kaj komunumojn de la loko.

La kompanio ĝuas renomon ĉe la vastaj amasoj pro sia elstara laborado, precipe pro sia fervora servado al la pasaĝeroj. En 1978 la kompanio estis elektita de la trafika departemento de nia lando kiel avangarda laborunujo.

Kiam mi intervjuis la gvidantojn de la kompanio kaj petis ilin prezenti sian sperton pri la pasaĝero-transportado, ili ĉiuj modeste diris: "Ni faris nur tion, kion ni devas fari, kaj en nia laboro troviĝas ankoraŭ mankoj!"

PASAĜERAŬTO SUR MALGRANDA INSULO

En la maro sudoriente de Yantai troviĝas malgranda insulo nomata Moye. Sur ĝi estas pli ol 2,000 loĝantoj, kiuj okupiĝas ĉefe pri fiŝkaptado. De antikveco la fiŝkaptistoj devis, dum

malfluso, travadi maron al la kontinento por aĉeti ĉiutagajn necesojn, kiel brulligno, rizo, oleo kaj salo, kaj vendi fiŝojn kaj salikokojn kaptitajn de ili. Post longa tempo multaj fiŝkaptistoj eksuferis artritron pro la vadado. Kiel forte ili deziris, ke iutage estonte konstruiĝu granda digo liganta la malgrandan insulon kun la kontinento! Kiel forte ili soifis, ke iutage estonte ili veturu al la kontinento per aŭto!

Iutage vere alveturis al la insulo pasaĝeraŭto dum malfluso. Tuj ekbolis la malgranda insulo! Oni amase venis rigardi. La infanoj saltadis de ĝojo, kaj iuj el la maljunuloj larmis de ekscitiĝo. Iu maljunulino kun blankaj haroj diris: "Dum dekoj da jaroj post kiam mi transloĝiĝis al la insulo por edziniĝo, estis tre tre malfacile por mi viziti la hejmon de miaj gepatroj. Nun venis aŭto, do mi certe veturos per ĝi por hejmenreveni!"

Kiam la unua aŭto alveturis por esplori vojon, fiŝkaptistoj venis unuj post aliaj por helpi. Ili staris en akvo alta ĝis la genuoj por montri vojon al la



Varma servado al pasaĝeroj

aŭto. Sur la insuleto ne troviĝis remizo. La amasoj meminitate gardis la aŭton. Kiam aŭtoradoj falis en sablokavon, la amasoj unuanime eltiris la aŭton . . .

Venkinte diversajn malfacilojn, la aŭto veturis inter la kontinento kaj la insuleto. Post certa tempo estis konstruita granda digo inter la du lokoj kaj finfine efektiviĝis la deziro de la amasoj. De tiam la insulanoj ne plu bezonis travadi la maron por iri al la kontinento.

TRANOKTADO EN KAMPARO

Kuangyuan estas malproksima vilaĝeto sur la marbordo en la suda parto de Rongcheng-gubernio. Okcidente de ĝi estas monto kaj oriente de ĝi maro. Por faciligi al la loĝantoj trafikon, oni larĝigis la tian zigzagan vojeton, tiel ke la aŭto povis eniri en la montvilaĝon.

La aŭto ne nur veturigas pasaĝerojn, sed ankaŭ kunportas



librojn, ĵurnalojn, poŝtaĵojn, medikamentojn, malgrandajn agrikulturilojn kaj ĉiutagajn necesajojn por la komunumoj, poŝtoŝicejoj, hospitaloj, lernejoj kaj butikoj ambaŭflanke de la ŝoseo.

Komence la aŭto elveturis el la gubernia urbo matene kaj reveturis el la kamparo vespere. Sed la pasaĝeroj pli kaj pli malmultiĝis. Kie kuŝis la kialo? La gvidantoj de la kompanio sendis fari enketon en la vilaĝoj ambaŭflanke de la ŝoseo. Komunumanoj diris: "Ni kamparanoj volas eniri en la gubernian urbon matene kaj reveni vespere. Alie estas tre maloportune por ni manĝi kaj tranokti en la gubernia urbo, kaj plie, ni devas elspezi pli da mono por tio. Kaj la tempo de via aŭtoveturado ne estas laŭ nia bezono." La kompanio kontentigis la amasojn per inversigo de la tempo de aŭtoveturado, kaj de tiam la aŭto tranoktas en kamparo por veturigi kamparanojn al la gubernia urbo en la sekvanta mateno.

EN LA AŬTOSTACIO DE YEXIAN-GUBERNIO

Antaŭ 15 jaroj la aŭtostacio de Yexian-gubernio estis elektita kiel avangarda laborunuo sur la tutlanda trafika fronto pro sia zorgema servado al la pasaĝeroj. Mi intervjuis staciestrojn Wang Qilin kaj Xu Zaihua kaj kelkajn junajn servistojn.

Ambaŭ estroj estis servistoj kaj elektitaj kiel avangardaj laborantoj en la sesdekaj jaroj. Estas laŭdirinde, ke preninte sur sin la gvidan laboron, ili kiel kutime servas al la pasaĝeroj kune kun aliaj servistoj. Ili foje-refoje plibonigis la metodojn de biletvendado. Krom

vendi biletojn en la stacio, ili ankaŭ akceptas mendon de biletoj per telefono kaj sendas biletojn al hospitaloj kaj hoteloj. Ili provizas pasaĝerojn per trinkakvo ne nur en atendejo, sed ankaŭ en la aŭto. Krome, ili ankaŭ vendas al la pasaĝeroj medikamenton kontraŭ veturmalsano.

En januaro pasintjare frostis terure. Iu maljunulino ĵus elauĝtiginta portis infanon en siaj brakoj. La infano ploradis forte kaj senĉese. La maljunulino tre maltrankviliĝis. Demandinte la servistoj de la aŭtostacio eksciis, ke tiu ĉi infano estas ne ŝia propra nepo, sed de ŝia kunvojaĝantino. La patrino de la infano malsaniĝis dumvoje kaj estis sendita al hospitalo, kaj ŝi konfidis sian infanon al la maljunulino kaj petis ŝin sendi ĝin al ĝia onklo, kiu instruas en Yexian-gubernio. Pro hasteco la maljunulino forgesis liajn nomon kaj lernejon kaj memoris nur tion, ke li estas instruisto. Informiĝinte pri tio, la servistoj interkonsiliĝis kaj ekagis. Iuj telefonis al lernejoj por serĉi la onklon de la infano, kaj aliaj

zorgis pri la infano. Ili serĉadis kaj fine sukcese sendis la infanon al la hejmo de ĝia onklo.

MALGRANDA DU EN LA AŬTOSTACIO DE LAIYANG

La aŭtostacia domo de Laiyang estas nova konstruaĵo. Ĝia atendejo estas larĝa kaj hela. En kaj ekster la domo regas pureco kaj bonordeco.

Tie mi vizitis junan serviston Du Shuqin, kiun multaj pasaĝeroj laŭdis. Malgranda Du, membro de la Komunisma Junulara Ligo, diplomitiĝis en supera mezlernejo, kaj ŝia hejmo estas en la kamparo. Antaŭ kvar jaroj ŝi sentis grandan ĝojon, kiam ŝi estis baldaŭ laboranta en la gubernia urbo. Tamen, kiam ŝi estis sendita labori kiel servistino, ŝi ĉagreniĝis, ĉar tiam ĉirklulis onidiro, ke servo estas peniga kaj facile kaŭzas malagrablaĵon. Ankaŭ tiel opiniis malgranda Du, tial ŝi tuttage laboris kun kuntiritaj brovoj.

Foje ŝi estis truanta biletojn ĉe la elirejo kaj trovis, ke infano de iu pasaĝero ne havas biletan. Ŝi petis lin aĉeti biletan. La pa-

Pasaĝeraŭto veturanta inter la gubernia urbo kaj la insulo



saĝero tamen petis ŝin fari tion anstataŭ li. Kiel ŝi povis forlasi sian postenon dum bilettruado! Okazis kverelo.

“Mi servas ne sole al vi!”

“Kion vi diras!”

“Tion mi volas!”

“Kia estas via sinteno?”

. . . .

Post tio maljuna servistino de la stacio Wang Jiayu interparolis kun ŝi kaj klarigis al ŝi la signifon de la serva laboro. Maljuna Wang demandis: “Kion vi plej dezirus, se vi estus pasaĝero?” Ŝi petis ŝin bone pripensiti. En la ĉiutaga servado malgranda Du vidis, ke fratino Wang servas ĉiam afable kaj ĝoje, meminciate helpas maljunulojn kaj infanojn, kaj paciencie respondas demandojn de pasaĝeroj. Tiel ŝi faris neordinaran aferon sur sia ordinara laborposteno. Helpate de fratino Wang, malgranda Du ekkomprenis la signifon de la serva laboro kaj decidis lerni de ŝi. En la stacio ŝi vendas biletojn rapide kaj senerare; ŝi vendas biletojn

ankaŭ en aŭto, varme helpas maljunulojn kaj infanojn dum ilia en- kaj elaŭtiĝo.

VETERANA ŜOFORO LIN GUOZHEN

Dum la lastaj jaroj en la Yantai-a Aŭta Transporta Kompanio aperis nombro da ŝoforoj, kiuj sekure plenumis veturadon de miliono da kilometroj. Ili kuras tutjare sur transportaj linioj, malgraŭ vento kaj pluvo. Ke Lin Guozhen sendis pasaĝerojn hejmen dum la Printempa Festo, tio estas laŭdata ankoraŭ nun.

Tio okazis en la antaŭvespero de la ĉina tradicia festotago — la Printempa Festo. Li veturigis jam 250 kilometrojn kaj kiam li sin pretigis hejmenveni por pasigi la feston kune kun siaj familianoj, lia gvidanto venis al li kaj diris: “Maljuna Lin, ĵus alveturis de Tianjin pasaĝerŝipo, kiu malfruiĝis pro ventego. . .” Tion aŭdinte, Lin Guozhen tuj komprenis, ke venis urĝa tasko. Li senhezite respondis: “Donu al mi la taskon, mi certe ĝin plenumos!”

La aŭtostacio de Laiyang-gubernio



Tiam estis la sepa horo nokte. Laŭ la ĉina tradicia moro la tuta familio devas kunesti antaŭ la noktomezo. Restis nur kvin horoj ĝis la noktomezo, sed la pasaĝeroj en la aŭto de Lin Guozhen devis esti senditaj al sep lokoj respektive. La aŭto ekveturis, kaj la pasaĝeroj inter-salutis kun ĝojo. Iom poste, la aŭto haltis ĉe la stacio Fushan, kaj du pasaĝeroj haste elaŭtiĝis. La zorgema veterana ŝoforo vidis, ke ili ambaŭ kun pakajo iras antaŭen en la direkto, en kiu ankaŭ la aŭto veturas, kaj demandis laŭte:

“Kien?”

“Al Liugong!”

“Reenaŭtiĝu!”

“Ni jam atingis nian stacion!”

“Vi atingis nur la stacion, sed ne vian hejmon. Hodiaŭ mi haltigas la aŭton ne laŭ la stacio. Vi povas elaŭtiĝi tie, kie estas plej proksime al viaj hejmoj. Rapidu en la aŭton. . .” Ili ambaŭ kun granda ĝojo reenaŭtiĝis.

Pli kaj pli malmultiĝis la pasaĝeroj en la aŭto. Fine restis en ĝi nur laboristino kaj ŝia pli-oldekjara filo venintaj el Tianjin. Ŝi demandis: “Majstro Lin, ĉu vi ankaŭ tiel sendas nin?” “Certe, eĉ unu mi sendas!” Tiel Lin Guozhen sendis ilin ĝis ilia vilaĝfino. Post kiam la laboristino elaŭtiĝis, ŝi ne povis diri eĉ unu vorton pro ekscitiĝo, dume la infano kriis laŭte: “Onklo Lin, dankon! Onklo Lin, feliĉan feston!”

En tiu momento oni jam revenis hejmen kaj kunestis kun siaj familianoj, dum Lin Guozhen, stirante la aŭton, galopis en frosta nokto.



La Kvar Mirindaĵoj de la Monto Huangshan

XI HUAZHANG:

XU Xiake (1586-1641), fama turisto de Ming-dinastio (1368-1644), estis ravita de la mirinda pejzaĝo de Huangshan post vizito al ĉiuj famaj montoj tra la lando. Li diris admire: "Vizitinte la kvin famajn montojn Taishan, Hengshan, Huashan, Hengshan kaj Songshan oni ne plu volas rigardi aliajn montojn, sed vizitinte Huangshan oni eĉ ne plu volas rigardi la kvin famajn montojn."

Huangshan situas en Anhui-provinco en orienta Ĉinio. Pasintjare ni vizitis ĝin kaj rimarkis, ke ĝi havas la belojn de diversaj famaj montoj. La plej belaj el ĝiaj rigardindaĵoj estas varma fonto, groteskaj rokoj, mirindaj pinoj kaj nubomaro, kiuj estas nomataj la kvar mirindaĵoj de Huangshan.

VARMA FONTO

Ni eniris la pejzaĝ-regionon de Huangshan, ascendis laŭ la serpenta vojo en la valoj kaj baldaŭ venis al la varma fonto, kie troviĝas la Huangshan-a Hotelo.


La varma akvo de la fonto ŝprucas el la rokfendo sub la montpinto Ziyunfeng. Ĝia temperaturo ĉiam restas ĉirkaŭ 42°C. Ĉiuhore elŝprucas 48 tunoj da akvo kaj la fonto neniam elĉerpigis. Iun jaron, Huangshan estis trafita de sekeco tre malofte vidita, ĉiuj riveroj kaj rojoj jam sekiĝis, sed la varma fonto ankoraŭ ŝprucis kiel antaŭe.

Oni diris, ke la varma fonto ligiĝas kun Zhushafeng (Cinabra Montpinto), kie troviĝas cina-

bro-mino, kiu probable havigas varmon al la fonto. Laŭ la libro "Historio de Huangshan", proksimume ĉiun 300-an jaron la fonto tute ruĝiĝis pro enmiksita cinabro, kaj denove klariĝis post du aŭ tri tagoj. Cinabra fonto estas pli bona ol la sulfura. Ĝi estas senkolora, senodora kaj taŭgas por bano kaj trinko. Kemia analizo montris, ke la varma fonto de Huangshan estas tute konforma al la higienaj normoj de trinka akvo. Plie, la akvo enhavas iom da silicio, kalcio, magnezio, kalio, natrio kaj aliaj elementoj utilaj por homa sano, kaj havas certan resanigan efikon por dermatozo, reŭmatismo kaj aliaj malsanoj de digesta kaj nerva sistemoj.

La Varmfonta Banejo lokiĝas apud la Huangshan-a Hotelo. Se

Nubomaro





Draka pino

vi banas vin per la fontoakvo en blanka bankuvo, vi certe sentas vin tre komforta. Ne estas mirige, ke antikva verkisto priskribis jene: “Sin baninte la sataj tuj malsatiĝas, la ebriaj tuj malebriiĝas, la tristaj tuj gajiĝas, la grizhumoraj tuj sereniĝas . . .”

GROTESKAJ ROKOJ

Huangshan havas multajn montpintojn, el kiuj 72 estis nomitaj kaj ĉiuj altas je pli ol 1,400 metroj super la marnivelo. Ili dividiĝas en du grupojn, la antaŭan kaj la malantaŭan. La antaŭaj montpintoj estas grandiozaj kaj la malantaŭaj belaj. La tri ĉefaj montpintoj — Lianhuafeng, Guangmingding kaj Tiandufeng ĉiuj altas je pli ol 1,800 metroj super la marnivelo.

Vizitintoj al Huangshan diris, ke vana estas vizito al Huangshan sen ascendo de Tiandufeng. De la montpiedo al la supro de Tiandufeng kondukas 1,500 metrojn longa vojeto kun granda dekliveco de pli ol 70° (ĉe la plej danĝera loko 85°). La kruta

ŝtona ŝtuparo similas al vertikala eskalo pendanta sur hakita rokmuro. Dum la ascendo oni devas tenadi la feran ĉenon, kaj la piedoj de la supra persono estas kvazaŭ metitaj sur la kapon de la malsupra. Proksime al la montpinto estas 100 metrojn longa montdorso, tute kalva kvazaŭ fiŝdorso elstaranta el akvo. Tial oni nomas ĝin “Karasa Dorso”. Tiun lokon kun profundegaj ravinoj en ambaŭ flankoj oni povas trapasi nur unuope, laŭvice, tenante la feran ĉenon. Trapasinte tiun danĝerejon oni atingas la pinton, kie oni povas vidi la tutan Huangshan. La montpintoj sube kaŝitaj en la nubondoj similas al ŝipoj flosantaj sur vasta maro. Norde estas Lianhuafeng, la plej alta pinto de Huangshan. Ĝi staras kun malgrandaj pintoj en la ĉirkaŭaĵo kvazaŭ lotusfloro, kiu ŝvebas sur nubondoj. Proksime de ĝi estas Lianruifeng, kiu similas al lotusflora burĝono. Sur la pinto de Tiandufeng troviĝas giganta roko en formo de boato flosanta sur la nubomaro. Starante sur la mont-


pinto, oni sentas sin kvazaŭ ŝvebanta en la ĉielo kun ruliĝantaj nuboj sub la piedoj. Tio estas vere mirinda sento ĝuebla per la ascendo de tiu pinto.

Malantaŭ Tiandufeng estas Shixinfeng. Ĝi estas malgranda, sed ĉarma. En tiu loko oni sentas sin kvazaŭ en bildo. Rigardante malsupren de Shixinfeng, oni vidas, ke staras multaj groteskaj rokoj, grandaj kaj malgrandaj, starantaj vertikale aŭ oblikve. Oni donis al ili laŭ iliaj formoj la nomojn “Kvin Maljunuloj en Boato”, “Ok Feoj sur Maro” k.t.p.

MIRINDAJ PINOJ

Oni diris: “Ĉe Huangshan ne estas roko sen pino kaj ne pino nemirinda.” Vere tiel estas. Ĉe la strangaj montpintoj kaj rokoj de Huangshan ĝenerale kreskas fortaj kaj belaj Huangshan-pinoj.

La praavo de Huangshan-pino estis la ĉina pino (*Pinus tabulaeformis*). Pere de vento kaj birdoj ĝi translokiĝis al Huang-



Groteskaj rokoj

shan kaj ŝanĝiĝis en Huangshan-pinon. Ĝi estis oficiale nomita de la ĉinaj botanikistoj en 1936. Tia pino kreskas nur en la loko alta 800 metrojn super la marnivelo. Huangshan-pino estas plena de vivpovo kaj povas enradikiĝi en rokfendoj kaj adaptiĝi al diversaj cirkonstancoj. Eĉ sur krutaĵoj kaj rokmuroj ĝi povas elkreski el fendetoj, aŭ staranta aŭ kuŝanta, aŭ tordiĝanta aŭ pendanta. Ju pli danĝera estas ĝia kreskejo, des pli mirinda estas ĝia formo. Ĝi

havas grandan artan ĉarmon kaj estas admirata de turistoj en kaj eksterlandaj.

Kiam oni venas al la templo Wenshuyuan sur Yupingfeng (Jadekrano)-montpinto 1,600 metrojn alta super la marnivelo traირinte la longan ŝtonŝtuparon, oni tuj rimarkas la altan freŝverdan "Gastaman Pinon". Ĝi afable staras etendante siajn branĉojn kvazaŭ dirante: "Bonvenon, gastoj venintaj de malproksimo!" Ankaŭ la pinoj Fenikso, Drako, Tigro kaj aliaj

ĉiuj havas siajn karakterojn konformajn al siaj nomoj.

NUBOMARO

Ĉe ĉiuj altaj montoj troviĝas nuboj. Sed malofta estas tia, kia la grandioza kaj ŝanĝiĝema nubomaro de Huangshan. Nubomaro formiĝas el varma kaj malseka aero, kiu leviĝas laŭ montodeklivo kaj renkontas malvarmon. Tamen ĉe la monto Taishan, kiu staras sola, nuboj ne haltas pro vento. La monto Lushan staras ĉe rivero, kaj tie la nuboj facile preterpasas. La nubomaro ĉe Emei-monto ne estas granda, ĉar tie la vetero ne estas tiel malseka kiel tiu en la Sudoriento. Ĉe Huangshan multaj montpintoj ĉirkaŭstaras kaj la aero estas malseka kaj varma, kio faciligas la amasiĝon de nuboj, tial formiĝas impona nubomaro.

Ĉe Huangshan estas ĉirkaŭ 200 nubaj tagoj en ĉiu jaro. Printempo estas la plej bona sezono por spekti nubomaron. Kvin lokoj taŭgas por tio, kaj plej oportune estas rigardi la "antaŭan maron" ĉe la templo Wenshuyuan sur Yupingfeng. La montpinto Yupingfeng alte staras, kun aliaj montpintoj en la ĉirkaŭaĵo, kaj ili formas, de sudoriento al nordokcidento, S-forman profundan valon. En la valo turbulas nubofumo kaj ruliĝas nubondoj, frapante la krutaĵojn kaj bruante animskue.


Ĉe Huangshan estas jenaj virdindaj: 2 lagoj, 3 grandaj akvofaloj, 14 kavernoj, 16 rojoj, 20 profundaj lagetoj, 24 fontoj kaj 72 montpintoj. Oni komparas la montojn kaj riverojn de Guilin kun serenado kaj la mirindan pejzaĝon de Huangshan kun simfonio. Post pripenso mi trovis tiun komparon tre ĝusta.

La monto Huangshan

Huangshan en sunradioj

Fotoj de Chen Fuli

大地激
：暖氣吹
一九六六年
陳復禮攝影






Pluvo



En malena krepusko

La monto Huangshan estas fama pitoreskejo de Ĉinio. Ĝi situas en la suda parto de Anhui-provinco. Ĝia areo estas ĉ. 1.300 kvadrataj kilometroj kaj ĝia ĉefa pinto Tiandufeng altas pli ol 1.800 metrojn. Ĝi havas ĉenon da verdaj pintoj, el kiuj 72 portas sian nomon. Ili estas nubskrapantaj, tre imponaj kaj majestaj. Sur krutaĵoj de diversaj montpintoj kreskas fortikaj pinoj. Post pluvo ekaperas tie densaj blankaj nuboj, kiuj similas al ondanta maro. Kaj oni nomas "kvar mirindaĵoj" la groteskajn rokojn, mirindajn pinojn, nubomaron kaj varman fonton de Huangshan.



Gastama pino

大雪壓青松，青松挺且直。
要知松高潔，待到雪化時。
陳毅



Něgovřítaj pinoj

CAO BAILONG:



Liu Yufang

Superklasa

Instruistino

Liu Yufang

EN la pitoreska ripozejo Beidaihe somerumis multaj laboristoj kaj oficistoj. Inter arboj troviĝis blanka sanatorio kaj la pasintan someron tie okazis la sperto-interŝanĝa kunveno de elstaraj element- kaj mez-lernejaj ĉefinstruistoj el 23 provincoj, municipoj kaj aŭtonomaj regionoj de Ĉinio. Tie mi multe informiĝis pri bonaj faroj de instruistino Liu Yufang de la elementa lernejo Anguang de la urbo Harbin, kaj mi decidis viziti ŝin.

Instruistino Liu laboris jam 32 jarojn en la nomita lernejo. Fininte la studon en altlernejo en 1945, ŝi elektis tiun profesion. Ŝi prenis sur sin la oficon de ĉefinstruisto kaj instruadis la ĉinan lingvon kaj matematikon al la alta klaso. Ekde la jaro 1954 la gelernantoj de 10 klasoj, kulturitaj de ŝi, ĉiuj sukcesis

trapasi la ekzamenon al mezlernejo.

Ŝi laboris ĉiam diligente dum 32 jaroj. Ĉiutage ŝi ellitiĝas je la kvina horo matene kaj, unu horon poste, komencas sian laboron. La dimanĉoj por ŝi estas eĉ pli penigaj ol kutime. Aŭ ŝi venis al la lernejo por prepari lecionojn kaj doni helpon al lernantoj, aŭ ŝi vizitis la familiojn de siaj instruistoj.

Iutage en majo, 1972, ŝi gvidis lernantojn en vetkurado kaj hazarde sin lezis je piedo. La vundo estis grava, tial oni devis tuj sendi ŝin al hospitalo. Tion ŝi rifuzis. Ŝi pensis, ke kuraci en hospitalo, kompreneble, estas bona rimedo, sed tio bezonas tri monatojn, kaj ŝi ja ne povas forlasi siajn lernantojn. Ŝi decidis ricevi kuracadon hejme.

En la sekvanta mateno instruistino Liu venis al la

lernejo en ĉareto puŝata de ŝia filo.

Kiam la sonorilo sonoris la lecionon, ŝi venis kiel kutime en la klasĉambro kaj lekciis absorbe. La lernantoj aŭskultis multe pli atente.

Tiamaniere ŝi daŭrigis sian instruadon tri monatojn kaj neniam forestis, eĉ en ventaj aŭ pluvaj tagoj.

Mi intervidiĝis kun ŝi en kvieta korto de la sanatorio. Kiam ŝi sciis pri mia intenco, ŝi diris: "Mi laboris ne tre multe. Veninte ĉi tien, mi kolektis jam multe da bonaj spertaĵoj de aliaj instruistoj kaj pasigis signifoplenajn agrablajn feriojn."

Poste ni turnis nian paroltemon al instruado. Mi demandis ŝin: "Kian rimedon vi aplikas por agordi la malsaman nivelon de lernantoj je inteligenteco?"

Ŝi respondis: “Ĉiuj povas bone plenumi sian lernotaskon escepte de malsanaj kaj debilecaj lernantoj, se mi faras laboron klopode.” En aŭtuno de 1977 ŝi transprenis la laboron instrui novan klason kaj rimarkis, ke malmultaj estas la fundamentaj scioj poseditaj de la lernantoj kaj malsama ilia klereco. Por sondi kalkulan kaj analizan kapablecon kaj fundamentajn sciojn de la lernantoj, ŝi faris 12 sinsekvajn ekzamenojn al ili en unu monato. Al la malsamnivelaj lernantoj ŝi donis adekvatajn helpojn kaj bone plenumis sian instruan taskon. Ŝi opinias, ke genio devenas de diligenta lernado, ju pli multe la geknaboj ĉerpas el la maro de scioj, des pli saĝaj ili fariĝas. Pro tio ŝi lasis ilin multe fari ekzercojn en lernado. En sia instruado ŝi tre atentis praktikadon kaj kuraĝigis la lernantojn multe cerbumadi mem. En la leciono pri la proporcio de cirkonferenco de cirklo kun ĝia diametro, ŝi postulis, ke ĉiu lernanto trovu unu aŭ du rondajn objektojn, mezuru iliajn diametrojn kaj cirkonferencon kaj kalkulu ilian proporcion. La geknaboj ĝoje revenis hejmen kaj mezuris la cirkonferencon kaj diametrojn de bicikla rado, vazo, kaldronkovrilo, sondisko, plato k.a. En la sekvanta tago ili konkure raportis al la instruistino siajn mezuritajn rezultojn. Kvankam la longeco de iliaj cirkonferencoj estas malsama, tamen la proporcio inter ili kaj iliaj diametroj estas sama je pli-ol-3-oblo. Post tio la geknaboj havis pli klaran konon pri ĝi.

Kiel ŝi traktis lernantojn peptolemajn kaj havantajn multajn mankojn? Ŝi diris al mi: “Geknaboj ne posedas fortan kapablecon distingigi pravon de

malpravo kaj havas multajn naivajn pensojn, tial estas neeviteble, ke ili faras tiajn aŭ aliajn erarojn. Al ili oni devas fari paciencajn edukadon kaj konvenan persvadojn. Oni devas ami ilin kiel patrino, sed samtempe ne devas indulgi iliajn erarojn.” Instruistino Liu faris multajn kortuŝajn aferojn tiurilate. Jen estas unu ekzemplo:

En la klaso kun ŝi kiel ĉefinstruistino troviĝis unu el la estraranoj de la klaso nomata Bai Guozhong, kiu estis diligenta kaj saĝa. Ĉe la komenco kiam ŝi prenis la laboron en sian manon, ŝi venigis lin kaj aliajn kvar estraranojn de la klaso por interkonsiliĝi pri pliigo de estraranoj. Ŝi demandis: “Kiel vi konsideras Lin Jiying?” Li respondis: “Ŝi estas stulta kaj ne lertas en parolado.” Poste ŝi menciis la nomojn de kelkaj aliaj lernantoj, sed Bai ĉiam oponis kontraŭ iuj kaj dubis pri kompetenteco de aliaj. Ŝi trovis, ke tiu saĝa knabo estas fiero. Foje la lernejo okazigis deklamacion kunvenon. En la komenco ŝi decidis, ke li funkciiu kiel ĉefdeklamanto. Li tre ĝojis de tio. Poste ŝi intence anstataŭigis lin per alia lernanto kaj funkciigis lin kiel anoncisto. Li paŭtis. En la unua provludo li anoncis deprimate. Post tio ŝi interparolis kun li, montrante, ke la ĉefdeklamanto ludas rolon de lokomotivo kaj la deklamantoj tiun de vagonoj; la lokomotivo estas senutila, se ĝi ne havas vagonojn por si tiratajn, malgraŭ ke ĝi posedas sufiĉan forton. Lernanto Bai diris: “Mi tute komprenis!” En la sekvanta tago li anoncis per sonora voĉo. Kvankam li iom progresis, tamen li ankoraŭ montris fierecon de tempo al tempo. Ek-

zemple, voĉlegante tekstojn aŭ farante respondojn, li afektas siajn tonojn por memlaŭdo.

Foje, en la leciono de matematiko la instruistino elmetis relative malfacilan kalkulan demandon al tri neintelligentaj lernantoj kaj ankaŭ al Bai, kiuj ĉiuj operaciadis samtempe sur la nigra tabulo. Antaŭ ol ŝi faris tion, ŝi donis ian helpon al la unuaj tri lernantoj. Unuflanke, ŝi intencis per tio eksciti ilian kuraĝon kaj aktivecon en lernado, kaj aliflanke, ŝi volis provi lernanton Bai kaj subpremi lian fierecon, ĉar la fieraj lernantoj ofte ne solide posedis siajn lernitajn sciojn. Kiel ŝi atendis, la unuaj tri lernantoj ĉiuj donis ĝustajn solvojn kaj ĝoje revenis al sia sidloko. En la unua fojo ankaŭ Bai korekte operaciis, sed li trovis sian solvon tute sama al tiuj de la aliaj kaj ekdubis je sia. Pro tio, li denove faris operaciadon fojon post fojo kaj fine donis eraran solvon. Ŝi demandis lin: “Ĉu vi senatente faris tion?” Li respondis: “Ne.” Post la leciono li venis al ŝi kaj diris: “Instruistino, mi estas implikita de fiereco kaj trompis min mem!” Ŝi diris al li: “Ĉiu el la lernantoj de nia klaso havas siajn fortajn kaj malfortajn punktojn, kaj devas venki siajn malfortajn punktojn per lerno de alies fortaj punktoj.” Dank’ al multfoja edukado li forigis sian fierecon kaj progresis tagon post tago. Nun li jam sukcesis trapasi la ekzamenon al mezlernejo.

El la supre menciita afero oni povas vidi, ke instruistino Liu havas koron plenan de fervoro por infanoj. Ĝuste pro tio ŝi ricevis pli kaj pli da estimo kaj amo de siaj lernantoj kaj iliaj gepatroj.



Steleto en Pentrarto

de HONG YING

IUN vesperon, post kiam la ok-jara Bu Di finrigardis la televidan programon “Kokidoj en Novan Loĝejon”, lia patro lin demandis: “Ĉu vi povas prezenti la programon per pentraĵo?” “Jes,” diris malgranda Bu Di kaj tuj prenis sian fontoplumon kaj faris per ĝi brilajn pentraĵojn nur en 15 minutoj. Sur la bildo prezentiĝas kvaretaga domo kun multaj fenestroj, en ĉiu el kiuj montriĝas kokido kun sia aparta pozo. Flanke de la domo iu knabino kolektas ovojn kaj apud ŝi staras du kamionoj por transporti la ovojn.

Tio estas unu el la ekzemploj, kiuj montras la mirindan kapa-

blon de imago kaj memoro de Bu Di. Tiu lia kapablo jam ricevis komunan rekonon de enlandaj belartistoj kaj ankaŭ laŭdon en la internacia konkurso de infanaj pentraĵoj okazigita en 1979 en Parizo. Ĉiuj partoprenantoj en tiu internacia konkurso aĝis je malpli ol 12 jaroj. La difinita temo estis “Mia Vivo en la Jaro 2000”.

En kelkaj semajnoj post kiam Ĉinio decidis partopreni en tiu konkurso, pli ol 200 infanaj pentraĵoj estis kolektitaj el 16 provincoj kaj urboj. 10 el ili estis elektitaj, inter kiuj estis ankaŭ la fantazia pentraĵo de malgranda Bu Di “Somera Kampado en Aero”. La pentristeto imagis al

si, ke post 20 jaroj li havos la eblecon inviti siajn geamiketojn veturi tra la kosmo per estonta flugmaŝino. Sur ĝi estas pentrita ankaŭ Tian’anmen-pordego kun verdaj kaj ore flavaj glazuritaj tegoloj.

Bu Di ekinteresiĝis pri pentrado en la aĝo de 5 jaroj. La libroŝranko en lia hejmo estas plena de liaj pentraĵoj. Tuj post kiam Bu Di ekmontris sian talenton, liaj gepatroj helpis kaj kuraĝigis lin, por ke li disvolvu laŭeble sian talenton en belarto. Lia patrino estas instruistino en mezlernejo kaj lia patro estas amato de lignogravuro kaj skulptado.

Lia patro diris: “Ni trejnas lin por ke li pentru laŭ sia memoro kaj imago, sed ne imitu aliajn.” Ekzemple, la gepatroj rigardis dufoje kun la infano la belartan filmon “Sun Vukong Ribelas kontraŭ la Ĉiela Palaco”. Post tio, malgranda Bu Di pentris ĉirkaŭ 100 paŝtelojn. Li ekskursis al parkoj kaj vizitis la belartan ekspozicion kune kun siaj gepatroj ofte en la libera tempo. Reveninte li tuj pentris kion li vidis. Li rakontas siajn travivaĵojn en taglibro per pentraĵoj.

La plej rimarkinda el la pentraĵoj de Bu Di estas tiu farita antaŭ du jaroj post vizito al la Beijing-a Zoologia Ĝardeno. Ĝi prezentas tigron aspektantan kiel serpento kaj aglon ĉirkaŭatakatan de aro da paseroj. Ĝi montras, ke la malfortaj povas unuigi kaj venki fortan malamikon.

“Kompreneble, multaj objektoj de li pentritaj estas misproportiaj pro lia manko de lerteeco,” diris la patro de Bu Di. “Tamen mi ŝatas ilin, ĉar ili estas riĉaj je imagoj.” Pro tio,



Pentraĵo, kiun Bu Di faris laŭ sia memoro post rigardo de la belarta filmo "Sun Vukong Ribelas kontraŭ la Ciela Palaco".

li ĉiam inspiras Bu Di pentri siajn proprajn travivaĵojn kaj atente ekzercas lin en lia observado. Kvankam la pentraĵoj de Bu Di ne estas laŭ la ortodoksaj reguloj, tamen ili enhavas naturajn sentojn kaj vivenerĝion kaj povas altiri eĉ veteranajn pentristojn.

Zhang Ding, ĉefo de la Centra Instituto de Artoj kaj Metioj, diris: "Pentraĵoj de malgranda Bu Di riĉas je naivaj spontaneaj sentoj kaj vere spegulas la realan vivon." El liaj pentraĵoj la veterana artisto vidis, ke la infano-artisto jam ekmontris sian talenton kaj havas brilan perspektivon.

Malgranda Bu Di havas ne nur fortan vidkapablon sed ankaŭ ŝaton de muziko. Li ofte

turnas aŭdfigurojn en vidfigurojn. Ekzemple, aŭskultinte la "Fantazian Simfonion" de L. H.



La knabino "Blanka Anserino" perdis sian vojon.

Ŝi venas en la valon, kie loĝas la Stona Maljunulo. La bonkora maljunulo sendas ŝin al ŝia hejmo. Per siaj kolektitaj sovaĝaj vinberoj ŝi resanigis la okulojn de siaj parencoj.

Jen pentraĵo farita post lego de la fabelo "Sovaĝaj Vinberoj".

Berlioz prezentitan de la Bostona Simfonia Orkestro sub la direktado de Seiĝi Ozava, li pentris hejme la muzikfigurojn kiuj plej profunde lin impresis. Laŭ la movimento "Kampara Pejzaĝo" en la simfonio, li pentris kamparon kaj kamparanon irantan kun ŝpato el sia korto.

Malgranda Bu Di ne estas mirinfano izoliginta de la socio, sed talenta artisteto. De post la fondiĝo de la Ĉina Popola Respubliko aperis en la lando multe da talentaj infanoj kiel malgranda Bu Di. En la Kvara Internacia Konkurso de Infanaj Pentraĵoj de 1978 en Finnlando, montriĝis 20 pentraĵoj de ĉinaj infanoj 5-15-jaraj. 17 el ili estis premiitaj: 6 akiris la unuagradan premion, 5 la duagradan kaj 6 la triagradan. Ili ĉiuj estas kulturitaj de infangardenoj, elementaj lernejoj, geknabaj domoj aŭ stacioj por eksterlernejaj aktivadoj. Krom la socia edukado, malgranda Bu Di havas ankaŭ speciale bonan familian edukon, dank' al kio li atingis elstaran sukceson.

Elekto de la Perlo

I

Por la gepatroj pli da infanoj signifas pli da ĉagrenoj.

Onklino Li aĝas 58 jarojn. Ŝia edzo mortis antaŭ 15 jaroj, kaj ŝi devis sola vivteni la tutan familion kun 3 filoj kaj unu filino. Supozeble ŝi suferis pluroble pli multe ol aliaj patrinoj. Feliĉe, nun ŝiaj infanoj jam kreskis en plenaĝulojn. En la vilaĝo ŝia familio havas plej multajn laborfortojn kaj sekve ilia vivo estas rimarkinde pli bona ol antaŭe.

Tion ja longe esperis Onklino Li. Sed ŝi ne atendis, ke ŝi devas pli multe zorgi pri la geedziĝoj de siaj infanoj. Ŝi rompis al si la kapon, kaj de tio blankiĝis ŝiaj haroj. En la lastaj jaroj ŝi vivis tre modeste kaj tiel ŝi sukcesis konstrui tri domojn.

Ŝia familio enloĝiĝis en la novaj domoj. Ŝi turnis la malnovan en tenejon de hejtaĵo kaj stalon. Ŝi dronis en ia ĝojo. Ŝi planis ornamati la novajn ĉambrojn en la venontaj 2-3 jaroj kaj poste prepari meblaron por sia plej aĝa filo Guoming, kaj pli poste por la aliaj filoj sinsekve.

Ekde la 25-jara aĝo de Guoming, oni jam svatis por li multajn knabinojn unu post alia, sed neniu el ili konsentis. En la lastaj 3 jaroj oni svatis por li ĉ. 10 fojojn, kaj lia patrino dekofoje preparis manĝaĵojn kun kokovoj kaj ĉiufoje la regalo estis vana. La respondoj estis

tiaj: "Iliaj domoj estas tre malmultaj, kaj estonte, se la fratoj vivos aparte, ĉiu el ili akiros po nur unu." "Ili ĉiuj estas kampuloj sensalajraj kaj la vivo estos malfacila."

Tiuj vortoj pikis Onklinon Li. Ŝi pensis, ke ŝi travivis multajn malfacilaĵojn kaj nun ŝi ekhavis la nunan vivon, sed neniu knabino volas edziniĝi al ŝiaj filoj — kiel ŝi povis ne ĉagreniĝi? En kiu flanko ŝiaj filoj montris malŝatindecon? Ŝiaj filoj ja estas kampuloj, honestaj, penemaj, diligentaj kaj ŝparemaj. Kaj cetere, ili ĉiuj estas ne malpli fortaj nek malpli belaj ol aliaj junuloj. Kial nun neniu volas svatiĝi al kampuloj? Onklino Li neniam grumblis kontraŭ la svatitoj, sed post ilia rifuzo ŝi ĉiam dronis en longa meditado.

En la kvara jaro, nome en la aĝo de plenaj 28 jaroj, Guoming fianĉiĝis al iu junulino en sia vilaĝo. La ceremonio de fianĉiĝo ne estas postulata de la Ĉina Geedziĝa Ĉarto, sed kutime tre grava afero en tiu loko. La manieroj por libera enamiĝo estas diversaj laŭ la karakteroj de enamiĝontoj. Guoming estis tre humila kaj neniam lernis kiel amindumi kaj povis fari nenion alian krom atendi alies svatadon. Li intervidiĝis plurfoje kun la junulino kaj sukcesis ilia libera enamiĝo. Guoming jam aĝas 29 jarojn kaj sendube edziĝos en la sekvanta vintro. Kun lia nupto koincidos la fianĉiĝa ceremonio de lia 27-jara frato

Guoliang. Ankaŭ lia fianĉino estas samvilaĝano, kuzino de Liu Xinhua, la vilaĝa direktantino pri virinaj aferoj. Nun oni kun ĝojo atendas la tagon, en kiu okazos la du ceremonioj. Tiam Onklino Li povos malŝarĝi sian koron.

II

Ĉisomere la rikolto de rizo estas senprecedence bona. En la korto de Onklino Li brediĝas porkoj, ŝafoj, kokoj kaj anasoj. Kiel kontenta estas Onklino Li! Ŝi senpacience atendadis la fianĉinon de Guoming. Sed ĝuste en tiu tempo la lasta sendis la svatinton sciigi, ke ŝi volas prokrasti la edziniĝon ĝis post 5 jaroj.

Onklino Li preskaŭ sufokiĝis, kvazaŭ ŝi estus frapita per klabo sur la kapon. Retenante sian koleron, ŝi demandis Guoming: "Ĉu vi ŝokis ŝin?"

"Panjo," Guoming sentis sin miskulpigita, "ĉu vi nepre volas, ke mi respondu?"

"Mi scias, ke vi ne plaĉas al ŝi," ĝemis la patrino.

Tiuj tre simplaj vortoj ekskuis la fortikan Guoming. Li diris kun emocio: "Panjo, kial vi diris tion?"

Onklino Li sidiĝis sur benketon kaj ekviŝis larmojn per antaŭtuko.

Ili ambaŭ sciis, ke tiuj vortoj ne estas ordinaraj. En la infanoj

neco de siaj filoj oni jam babilaĉis, ke ili estas stultaj. Sed Onklino Li kontraŭdiris: “Miaj infanoj estas laboremaj kaj cetere ŝatas cerbumi kiel fari sian laboron pli bone. Ĉu stultaj? Li tute ne kapablas flati aliajn per mielaj vortoj.” Kiam Guoming aĝis 17 jarojn, lia onklo volis sendi lin lerni me-

tiarton. Sed la majstro estis tro rigida, kaj nur tiuj metilernantoj, kiuj plaĉis al li, povis ellerni lian teknikon. Onklino Li pensis tri tagojn kaj tri noktojn kaj fine rifuzis la proponon: “Nu, lasu Guoming resti hejme por terkulturo, ĉar li ne kapablas plaĉi al aliaj kaj cetere mi ne volas ke li fariĝu plaĉivola.”

Dum kreskado de siaj filoj Onklino Li multfoje ripetis: “Ni estas honesta familio, vivas kun pura konscienco kaj neniam avidas alies gajnon. Pli bona honora perdo ol malnobla profito. Mi preferas vivi malriĉe ol humilaĉe. Mi preferas honestan stultecon ol flatemon. Ni ĝojas, kiam ni estas agrablaj por aliaj; ni ne ĉagreniĝas, kiam ni ne estas tiaj. Ni ne povas devigi aliajn plaĉi al ni. Kaj devigita plaĉo ne povas nin ĝojigi.”

Siaj vortoj gravuriĝis en la memoro de la gefiloj. Sed nun ŝi eldiris tute ne kutimajn vortojn, kaj el tio Guoming komprenis la mezuron de melankolio de sia patrino.

“Panjo,” Guoming diris firme, “mi iru demandi.”

“Pri kio?”

“Kial ili ŝanĝis la decidon?”

Onklino Li meditadis tri tagojn kaj tri noktojn kaj diris al Guoming: “Vi ne iru! Ilia prokrasto estas nur preteksto.”

“Ĉu?”

“Sendube. Ili pentis kaj intencas repreni la promeson pri fianĉiĝo.”

“Sed kial ili ne diris senkaŝe?”

“Jen la ruzajo. Vi jam estas 29-jara, ĉu vi povas atendi ankoraŭ 5 jarojn? Dume ili estas certaj, ke vi ne havas la paciencon atendi tiom longe kaj mem nuligos la fianĉiĝon. Ili ja tion atendas kaj tiel ili ne bezonos kovri nian elspezon por la fianĉiĝo.”

“Nu, mi atentos 5 jarojn!” indigniĝis Guoming.

“Ĉu vi havas tian paciencon?”



Onklino Li ĉiam dronis en longa meditado post la rifuzo de la svatitoj.

Ilustrita de QIN LONG

“Jes.”

“Ĝi ne amas vin plu kaj kial vi ankoraŭ atendas ĝin? Eĉ se vi ĝisatendos, ĉu vi povos vivi feliĉe?”

“Mi povas nur atendi. Ne estas malfacile atendi 5 jarojn,” simple respondis Guoming.

“Atendi —, jes, mi aprobas,” Onklino Li diris post medito. “Ni ja ne verŝas koleron, sed devas malkaŝe diri al ili: ‘Bone, ni atendos. Ni atendos 5 jarojn. Post 5 jaroj ni povos vidi klare la aferon.’ Mia infano, ĉu mi prave diris?”

Guoming meditadis tri tagojn kaj tri noktojn kaj diris: “Jes, panjo, vi diris prave. Se ĝi ne amas min, certe mi ne povos atendi tiel longe. Se ĝi povos atendi 5 jarojn, tio signifas, ke ĝi vere amas min. Jes, mi devas atendi.”

La vortoj de Guoming estis transdiritaj de la svatinto al la fianĉino.

Baldaŭ komenciĝis la intensa aŭtuna rikoltado. Ĉiuj estis tre okupataj kaj la afero estis flankenmetita portempe. Sed, krom flankenmeti, kion alian Onklino Li povis fari? Ĝi planis plenumi la fianĉiĝon de la dua filo Guoliang post la rikoltado.

Neatendite, kiam la afero pri Guoming disvastiĝis en la vilaĝo, tuj sekvis alia problemo: Ankaŭ hezitiĝis la amatino de Guoliang. Ĝi proponis prokrasti la fianĉiĝon, ĉar ĝi volis pli detale informiĝi pri la familio de Guoliang. Abortis do ambaŭ ĝojigaj aferoj.

(Daŭrigota)



Yuan Xiaocen en sia laborejo

Pri la Skulpturo kaj Pikturo de Yuan Xiaocen

YUAN Xiaocen estas fama ĉina skulptisto kaj pentristo, kaj ankaŭ belarta edukisto, ĉar li longe okupiĝas pri belarta instruado.


En 1915, li naskiĝis en montvilaĝo de Puding-gubernio, Guizhou (Gujĝoŭ)-provinco. Li vivas longe en la regiono de nacimalplimulto en sudokcidenta Ĉinio. Heredante tradiciojn de la ĉina skulpturo kaj asimilinte superaĵojn de la okcidenta skulpturo, li formis sian originalan stilon. Lia fama verko “Patrino kaj Filino en Klerigado” temas pri ĉiutaga vivo de la popolo. Arta komentariisto Wang Chao-wen diris, ke liaj verkoj aspektas ordinaraj, tamen estas tre ĉarmaj. En sia arta kreado, li

modlis figurojn de nacimalplimultaj popolanoj, ankaŭ raraj floroj kaj birdoj en tiuj lokoj estas liaj temoj en la kreado. Li estas plej lerta en pentrado de pavo. Surbaze de heredo de la tradicia tekniko, li kreis novon en tekniko. Li havas sian originalecon en kolora pentrado de floroj, birdoj kaj bestoj. Ekzemple, la de li pentritaj anasidoj kaj pavoj aperigitaj en tiu ĉi numero estas tre viglaj, ĉarmaj kaj gustoriĉaj.

Yuan Xiaocen estas komitatano de la Asocio de Ĉinaj Belartistoj, prezidanto de la Yun-nan-provinca filio de la nomita asocio kaj profesoro de la arta fakultato de la Kunming-a Normala Instituto.





Patrino kaj filino en lernado (skulptaĵo)



Anasidoj naĝas en lageto. (ĉinstila pentraĵo)

La danco "Pavo" (skulptaĵo)





Ji-nacieca bredistino

La Torĉa Festo de la Ji-oj

La tradicia Torĉa Festo de la Ji-oj jam havas historion de pli ol 1,000 jaroj. La 24-an de la sesa monato ĉiujare laŭ la luna kalendaro, la ji-oj kaj la popolanoj de aliaj naciecoj kolektiĝas kune en festaj vestoj. Ili tenas torĉojn, bruligas kampfajron, ĝoje kantas kaj dancas kaj partoprenas en diversaj sportaj aktivadoj.

La ji-oj, kiuj loĝas ĉefe en la sudokcidento de la lando, precipe en Yunnan-provinco, estas unu el la ĉefaj nacimalplimulto de Ĉinio kun pli ol miliono da membroj. La fotoj montras, kiel la ji-oj en la Lunan-a Ji-nacieca Aŭtonoma Gubernio, Yunnan-provinco, pasigas sian Torĉan Feston.

La gajnintoj en la luktado estas premiitaj per ruĝa rubando, kaj devas ĉirkaŭiri en konkursejo por saluti.

Tradicia luktado en la festo



Festotaga amuzo





Nokto de la festo





Ji-aj knabinoj en festaj vestoj

En vendoplaco okaze de la Torĉa Festo



Baleto

“Sur la Silka Vojo”



LA nomita baleto nun surscenigita en Beijing (vidu kolorajn kaj nigra-blankajn fotojn pri ĝi en ĉi numero) allogis milojn kaj milojn da spektantoj per sia viveca intrigo, variantaj dancmovoj kaj belaj lirikaj melodioj.

La baleto kreita en konsulto de la brilaj freskoj en Dunhuang, kun historia fono de la meza periodo de Tang-dinastio (618-907 p.K.), la plej prospera periodo de la feŭda socio de Ĉinio, priskribas zigzagajn travivaĵojn de maljuna pentristo de Mogao-kavernaro de Dunhuang Magia Peniko Zhang kaj lia filino Yingniang kaj ilian intiman rilaton kun persa komercisto Inus, kaj tio reaperigas la vivon kaj morojn de Tang-dinastio kaj scenojn prezentitajn de freskoj de Dunhuang.

Tiun baleton ludas la Gansu-provinca Ensemblo el nordokcidenta Ĉinio.

Gansu estis trairejo de la “silka vojo” interliganta la antikvan Ĉinion kaj mezan Azion kaj Eŭropon. Antaŭ 1,600 jaroj, ĉinaj artistoj jam komencis konstrui Mogao-kavernaron kun freskoj en Dunhuang de Gansu-provinco kaj la konstruado daŭris pli ol mil jarojn. Nun plejparto de ĝi estas bone konservita, kaj en ĝi troviĝas

freskoj kun areo de pli ol 45,000 kvadrataj metroj kaj pli ol 2,000 statuoj. Ĝi estis kreita surbaze de ensorbado kaj asimilado de fremdlanda arto dum interŝanĝo de ekonomio kaj kulturo inter Ĉinio kaj fremdaj landoj. Ĝi estas unu el la galerioj de la ĉina antikva belarto kaj ankaŭ unu el la fame konataj artaj trezorejoj de la mondo.

En ĉarma muziko de bambua fluto kaj sonorado de kamelaj tintiloj malrapide malfermiĝas la kurteno. Flugantaj Feinoj gaje dancantaj en pluvo de flirtantaj florpetaloj kondukas la spektantojn al malproksimaj jaroj, al la “silka vojo”.

Subite leviĝas ŝtormo en la dezerto. Maljuna pentristo Magia Peniko Zhang savas survoje persan komerciston Inus el danĝero, dum lia kara filino Yingniang estas forrabata de fiuloj.

Post kvin jaroj la maljuna pentristo Zhang retrovis, en grava komerca urbo Dunhuang, sian filinon, kiu tiam jam fariĝis mallibera dancistino. Iu persa komercisto, malavara en helpo al aliuloj en malfacileco, reaĉetas por la maljunulo la personan liberecon de Yingniang, tiel ke la patro kaj filino povas kunesti. Tiam la maljuna pentristo trovas, ke la persa



Yingniang



Magia Peniko Zhang

Inus



komercisto estas neniu alia ol Inus. La komerca administranto avidas Yingniang pro ŝia beleco kaj provas ŝin proprigi al si. Trovinte neniun alian rimedon por savi Yingniang, la maljuna pentristo proponas, ke Inus adoptu lian filinon kaj konduku ŝin al Persio por rifuĝo. En Persio Yingniang vivas kun tieaj popolanoj en harmonio kaj ili lernigas unu al alia artojn kaj stariĝis inter si profundan amikecon.

Post kelkaj jaroj Tang-dinastio okazigas en Dunhuang foiron kun partopreno de 27 landoj. Adiaŭinte Persion Yingniang surpaŝas, kune kun Inus, la vojon por reveni al la patrolando. Estas malfeliĉe, ke ili trafas survoje rabadon de subuloj de la komerca administranto. La maljuna pentristo ekbruligis alarman fajron kaj per tio refoje savis Inus el la danĝero, tamen li mem oferis sian vivon sur la silka vojo. En la foiro Yingniang alivestita prezentas dancon kaj ŝi konigas, profitante la okazon,

al la kortega sendito de Tang-dinastio krimojn de la komerca administranto. Kaj per tio Yingniang forigis tiun fiulon kaŝitan sur la silka vojo.

La maljuna pentristo Magia Peniko Zhang en la baletoreprezentas la nekalkuleblajn metiartistojn kreintajn la arton de Dunhuang, Yingniang estis tipo de miloj kaj dekmiloj da dancistinoj. Inus estis unu el la sennombraj amikaj delegitoj sur la silka vojo, la kortega sendito de Tang-dinastio estis figuro de justa ŝtatoficisto dezirata de la laboranta popolo en la feŭda socio, dum la fiaj oficistoj kiel la administranto estas ofte viditaj en la historiaj materialoj de Tang-dinastio kaj ankaŭ spegulitaj en freskoj en Mogao-kavernaro. La verkintoj kaj reĝisoro de la baletoprenis grandan kvanton da dancfiguroj en freskoj de Dunhuang kiel krudan materialon kaj faris artan imagon kaj kuraĝan kreadon surbaze

de la ĉinaj klasikaj dancoj. Surbaze de apartaj historiaj fragmentoj, izolaj kaj senmovaj figuroj kaj momentaj pozoj de danco, ili kreis novan nacian dancon, kiu estas diferenca de ordinaraj ĉinaj klasikaj dancoj kaj havas klaran tradician stilon. Samtempe, laŭ la malsamaj karakteroj de roloj kaj la evoluo de la intrigo ili kreis diversajn sendependajn dancojn, konforme al la temo de la baletoreprezentado. Ekzemple, kiam Yingniang alten levas sian dekstran piedon kaj etendas siajn brakojn malantaŭen por pluki la kordojn per siaj fingroj, en la solo "Bivoplukado post la kapo" tuj aŭdiĝas muziko de bivo. Tiuj dancmovoj estas kreitaj laŭ du freskoj en Mogao-kavernaro. Krome, la reĝisoro de la baletoreprezentado lerte aranĝis aperon de tiu solo en la tempo, kiam la filino klopodas por inspiri la patron al pentrado. Tio montras la bonkorecon kaj belecon de Yingniang kaj ŝian lertecon en kantado kaj dancado.



KONGRESOJ DE LA ĈINAJ DEMOKRATIAJ PARTIOJ

En oktobro de 1979 okazis en Beijing (Pekino) la Kvina Tutlanda Kongreso de la Revolucia Komitato de la Ĉina Kuomintango, la Kvara Tutlanda Kongreso de la Ĉina Demokratia Ligo, la Tria Tutlanda Kongreso de la Ĉina Demokratia Landkonstrua Asocio, la Kvara Kongreso de la Ĉina Asocio por Akcelo de Demokratio, la Oka

Tutlanda Kongreso de la Ĉina Kamparana kaj Laborista Demokratia Partio, la Sepa Kongreso de la Ĉina Zhiĝong-partio, la Tria Tutlanda Kongreso de Jiusan-Societo, la Dua Kongreso de la Taiwan-a Demokratia Aŭtonomia Ligo kaj la Kvara Kongreso de la Tutĉinia Federacio de Industriistoj kaj Komercistoj. 2,533 reprezentantoj ĉeestis tiujn kongresojn.

En tiuj kongresoj, ĉiu el la nomitaj partioj resumis respektive siajn laborojn en la pasintaj pli ol 20 jaroj, difinis la orientilojn kaj taskojn por la estonta laboro, reviziis sian statuton kaj elektis la centran gvidantaron. La okazigo de tiuj kongresoj havas gravan signifon por movi la membrojn de tiuj par-

tioj fari novajn kontribuojn por la efektivigo de la kvar modernigoj kaj reveno de Taiwan al la patrolando.

En la Kontraŭjapana Rezistmilito kaj la Liberiga Milito de Ĉinio, la nomitaj demokratiaj partioj jam kunlaboradis kun la Komunista Partio de Ĉinio en la batalo kontraŭ imperiismo kaj la reakcia regado de Kuomintango kaj faris sian kontribuon al la liberiga afero de la ĉina popolo. Responde al la alvoko de la Komunista Partio de Ĉinio, ili partoprenis en la Ĉina Popola Politika Interkonsilia Konferenco en septembro de 1949. Ili estas konsistigaj partoj de la revolucia unueca fronto sub la gvido de la Komunista Partio de Ĉinio.

En la gastobonveniga kunveno de la foiro prezentiĝas kolektiva danco de 16 knabinoj. La dan-cistinoj estas en pompaj kaj mal-pezaj vestoj, iliaj skarpoj flirtas kvazaŭ koloraj nuboj, iliaj jupoj ŝvebas kvazaŭ ĉielarkoj kaj iliaj haroj estas zorgeme kaj bele aranĝitaj kaj ornamitaj per perloj kaj juveloj. Por projekti tiun pecon de danco oni ne nur konsultis danctingojn en la freskoj, sed ankaŭ studis poemojn de Tang-dinastio pri muziko kaj danco, kaj poste ili plenumis tion laŭ poemo de la fama poeto Bai Juyi de Tang-dinastio.

La baleto akiris vastan favoron en la Beijing-a scenejo ankaŭ per zorge kaj artisme projektitaj dekoracioj. La artistoj kombinis la realecon de la vivo kaj la historio en realecon de arto. Ni prenu ekzemple la domon de Inus en la tria sceno: La dekoracio estas helkolora, impona kaj grandioza. Proksime, foliriĉaj vinberujoj volvas ko-

ridorajn kolonojn, kristalaj vinberaj grapoloj peze pendas sur la laŭbo, estas belaj balustradoj, ŝprucanta fontano, pompaj persaj tapiŝoj, belaj floroj k.a. Fore, staras islama moskeo sub la blua ĉielo. Yingniang lernigas al persaj knabinoj ĉinan brodarton. Kiam ili kune ekdancas, sur la scenejo prezentiĝas ĝenro de fremda lando.

La kreintoj de la baleto elverŝis grandan energion ankaŭ en projektado de la kostumoj kaj figuroj. En la tuta baleto oni aplikis 20 specojn de hararanĝo, inter kiuj tiu de Tang-dinastio altas je 45 cm. La pli ol 200 harmonie aranĝitaj helkoloraj kostumoj ne nur konformas al fasonoj kaj stiloj de Tang-dinastio antaŭ pli ol mil jaroj, sed ankaŭ al postulo de la baleto.

Artaj komentariistoj unuanime opinias, ke la baleto estas bela floro en la ĝardeno de la ĉina baleta arto.



La reĝisoro kaj geaktoroj kune studas la intrigon.

Ŝminkado




NOVA ATINGO DE ĈINIO EN ESPLORADO DE INSULINO

En 1965, la Shanghai-a Biokemia Instituto kaj la Shanghai-a Instituto de Organika Kemio sub la Ĉina Akademio de Sciencoj kaj la Beijing-a Universitato en kunlaboro sukcesis sintezi, unuafoje en la mondo, proteinion kun plena vivipovo, nome kristalan bovan insulinon, kio markis la komencon de nova periodo en sintezado de insulinokaj estis alte taksita de internaciaj sciencaj rondoj. Depost tio, Ĉinio akiris plue serion da novaj fruktoj en sintezado de insulinokaj analizado de la strukturo de ĝia kristalo, la interrilato inter la strukturo kaj funkcio de insulinokaj la sintezado kaj aplikado de peptidaj


hormonoj kaj esplorado pri sinteza metodo.

La sukcesoj de Ĉinio en esplorado de insulinokaj vekis atenton kaj prizorgon de internaciaj biologoj, kaj multaj eksterlandaj sciencistoj vizitis la Shanghai-an Biokemian Instituton kaj aliajn koncernajn instituciojn por scienca interfluo. Lastatempe, D-ro Tregear de la Instituto Howard Florey pri Eksperimenta Fiziologio kaj Medicino de la Melburna Universitato de Aŭstralio faris, en kunlaboro kun laborantoj de la Unua Sekcio de la Shanghai-a Biokemia Instituto, esploron pri rekombino de natura elastino, pri kio D-ro Tregear sin okupadas. Aplikante la metodon de sintezado de insulinokaj, ili akiris unuapaŝan suk-



Teknikistoj de la Shanghai-a Biokemia Instituto faras eksperimenton.

ceson en iom pli-ol-unumonata eksperimentado kaj kreis kondiĉojn por pli profunda esplorado.



EN LA REGIONOJ DE NACIMALPLIMULTOJ

VOJAĜO

EN


DIEXI

de KANG QINGLIANG

EN la montaro de nordokcidenta Sichuan (Siĉuan) troviĝas kelke da grandaj kaj malgrandaj lagoj. Se oni rigardas malsupren en aviadilo, oni vidas, ke ili similas al speguloj, inkrustitaj en la montĉenoj, kaj brilas en la suno. Tiuj lagoj en Diexi de Maowen-gubernio formiĝis pro tertremo en 1933.

Ĉjang-nacieco, unu el la ĉinaj nacimalplimulto kun longa historio, loĝas sur areo de kelkcent kvadrataj kilometroj en Diexi-regiono.

Postlabora propaganda trupo de la aŭtonoma gubernio prezentas por la amasoj.



Antaŭ nelonge mi vizitis tiun lokon. Mi startis de Chengdu (Ĉengdu), la ĉefurbo de Sichuan-provinco, kaj post 5-6 horoj da veturado laŭ la serpenta ŝoseo sur bordo de Minjiang-rivero nordokcidenten tra Dujiangyan, mi venis en la hejmlokon de la ĉjang-oj.

Tie ondas la montoj kaj sudentorentas Minjiang-rivero. Sur la altaj montoj kreskas densaj primitivaj arbaroj; sur la herbejoj sur la malkrutaj deklivoj paŝtiĝas gregoj kaj gregoj da grasaj ŝafoj. En la verdaj arbedoj ĉe monttaloj troviĝas antikvaj fortikajoj de ĉjang-nacieco. Ili, fortikaj kaj originalaj, en formoj de kvadrato, sesangulo kaj okangulo, estis masonitaj el ŝtonoj kaj argilo. Antaŭ la Liberiĝo ili estis uzataj kiel barajo kontraŭ la malamikoj, kaj post la Liberiĝo oni turnis ilin en loĝejojn aŭ tenejojn de greno kaj aliaj objektoj.

Sur la kampoj kaj paŝtejoj ĝoje laboras viroj kaj virinoj de ĉjang-nacieco. La virinoj ŝatas porti hele bluan robon, nigran kaptukon ornamitan per diverskoloraj fadenoj kaj arĝentajoj, arĝentajn brak- kaj orelringojn, kaj tintadas iliaj arĝentaj ornamatoj, kiam ili iras. Plejparto de la viroj portas robon kun pasamentoj kaj veŝton el ŝafa pelto. Ili akre kriadas, kiam ili ĝojas. La

deseĝnatoj sur la vestoj de la ĉjang-oj estas delikate broditaj de virinoj. La ĉjang-oj amas kanti. Aŭdiĝas de tempo al tempo belaj kantoj, kiam ili laboras. En festotagoj aŭ postlaboraj horoj ili kantas dancante kun akompano de bambuaj flutoj kaj buŝharmonikoj aparte belsonaj.

En la historio ĉjang-nacieco tre prosperis en nordokcidenta Ĉinio. Tamen, pro oftaj militoj, kruelaj subpremoj kaj disvastiĝintaj epidemioj dum longaj jaroj, ĝi iom post iom proksimiĝis al pereco. Antaŭvespere de la Liberiĝo restis nur 30,000 ĉjang-oj en la supra baseno de Minjiang-rivero de Sichuan-provinco. Post la Liberiĝo ĉjang-nacieco fariĝis membro de la granda familio de ĉiuj egalaj naciecoj de Ĉinio. La registaro fondis aŭtonoman gubernion en Maowen, kie dense loĝas ĉjang-oj. Nun la nombro de la ĉjang-oj kreskis jam ĝis pli ol 80,000.

Nia aŭto preterveturis ĉjang-vilaĝojn kaj baldaŭ atingis la faman lagon Diexi. Mi memoras, ke en mia infaneco pliaĝuloj diris, ke kiam la lago furiozas, ĝi povas inundi Chengdu-ebenaĵon, kiu troviĝas en la malsupra baseno de Minjiang-rivero kaj estas pli ol 200 kilometrojn for de Diexi. Mia

Riĉa rikolto



hejmo estis sur Chengdu-ebenaĵo, tial ni timegis en ĉiu inunda sezono. Hodiaŭ mi atingis la lagon kaj tre volis vidi, kia ĝi efektive estas. Mi rigardis malproksimen kaj vidis, ke la verda lago spegulas la lazuran ĉielon kaj blankan nubaron, kaj ke la longa Minĵiang-rivero elfluas el montaro, trafluas la lagon kaj kuras al foraj altaj montoj. Ĉirkaŭ la lago klare videblas postsigno de grandarea deglitiĝo de deklivo kaŭzita de la tertremo. Oni ne scias, ĉu la ĉjang-oj jungis ĝin aŭ ĝi mem ŝanĝis sian temperamenton, ĉar la hodiaŭa Diexi-lago aspektas tre kvieta kaj ne plu terura.

En la antikveco Diexi estis grava strategia urbo kun fortikaj ĉirkaŭmuroj. Kaŭze de la granda tertremo en 1933, falis montoj ĉirkaŭ la antikva urbo kaj kovris ĝin kaj la najbarajn vilaĝojn, kaj amasegoj da ŝtonoj ruliĝis en Minĵiang-riveron kaj ŝtopis ĝin, tiel ke ĝi ŝveliĝis abrupte kaj transformiĝis en lagojn. La plej granda el ili havas longecon de dekelkaj kilometroj kaj profundecon de pli ol 130 metroj. Post tiu tertremo nur tre malmultaj ĉjang-oj restis vivaj.

En Jiaochangba proksima al la lago Diexi, ni vizitis la 58-jaran maljunulon de ĉjang-nacieco Wen Yanping, unu el la hazardaj postvivantoj. Lia familio havas ok anojn kaj loĝas en ses-ĉambra tegoltegmenta domo. El liaj ses infanoj unu laboras kiel filmoprojekciisto de la komunuma filmoprojekcia grupo, alia estas kontisto de la brigada pomĝardeno kaj la ceteraj vizitas lernejojn. Li mem estas paŝtisto de la produkta taĉmento. La jara enspezo de la tuta familio sufiĉas por havigi al ĝi bezonatajn nutraĵojn kaj vestojn.

Parolante pri la tertremo en la tridekaj jaroj, la maljunulo forte emociiĝis. Li diris, ke post la tertremo li kaj aliaj hazardaj postvivantoj vagis al la sidejo de la gubernia registaro, sed anstataŭ do-


ni al ili helpoj, la kuomintanga gubernia registaro rigardis ilin kiel "plago-diablojn" kaj "kulpulojn", kiuj kaŭzis la katastrofon de tertremo, kaj forpelis ilin el la gubernia urbo. Li vagadis tien kaj tien kaj trovis nenian rimedon por sin vivteni. Finfine li revenis al sia hejmloko — ruino de la urbo Diexi. Li enloĝiĝis en pasejo de urbopordego, kiu ankoraŭ ne tute disfalis. Sur la ruino li kreis terpecojn, kulturis ilin kaj poste edziĝis kaj vivtenis siajn infanojn. Tiu loko forlasita de la reganta klaso allogis alilokajn ĉjang-ojn, kiuj ne povis vivteni sin. Ili fuĝis tien, kreis kampojn kaj diligente plugis ilin. Kun la paso de tempo, denove regis viveco ĉirkaŭ la lago Diexi. Nun en la montvilaĝo, kie Wen Yanping loĝas, jam fondiĝis produkta brigado kun 400 loĝantoj el pli ol 80 familioj. Ankaŭ la distrikta registaro kaj komunuma administrejo sidas tie. Kaj ankaŭ la ĉirkaŭaj vilaĝoj restariĝis antaŭlonge.

Estas interese, ke Wen Yanping, suferinto de la supre menciita tertremo, nun funkcias kiel observanto de la tertrema prognoza punkto en Diexi-regiono. Li komprenis, ke tertremo estas natura fenomeno, kies leĝo povas esti iom post iom konata kaj posedata. En 1976, alia granda tertremo okazis proksime de lia



Novaj orelingoj

hejmloko. Du tagojn antaŭ la tertremo ili rimarkis makro- kaj mikrofenomenojn de forta tertremo, ekbrilojn de lumo antaŭ ĝi kaj anormalan reakcion de bestoj. Kombinante la grandareajn prognozojn de la sismologia buroo, ili faris anoncon pri la baldaŭ okazonta tertremo, por ke ĉiuj sin preparu por tio. Efektive en la najbara gubernio okazis granda tertremo de 7.2 gradoj, sed en ilia loko neniu vik-



La maljunulo Wen Yanping observas sismografon.

timiĝis kaj iliaj perdoj estis malgrandaj. Iu vilaĝo malleviĝis pli ol unu metron. La popola registaro rapide alsendis delegacion por zorgi la suferantojn kaj aparte asignis monon por konstrui novan vilaĝon. La amasoj plagitaj de la tertremo diris kun emocio: "Tute malsamaj estas la nova kaj malnova socioj!"

Ni promenis sur strato de Jiao-changba kaj rimarkis neniun postsignon de tiu tertremo. Ĝi estas prospera urbeto en montregiono. Du vicoj da domoj staras ĉe la montpiedo. En la butikoj montriĝas diversspecaj komercaĵoj necesaj por la ĉiutaga vivo de la ĉjang-oj, kaj sur la ŝoseo aŭtoj veturas tien kaj ĉi tien. Starante sur altaĵo, ni vidis, ke sur la ŝtonozaj montodeklivoj post la tertremo kreskas piparboj, pomarboj kaj juglandarboj kun abundaj fruktoj, kaj sur la ŝtuparkampoj kreskas maizo kun longaj spikoj. Sur la montoj 2,000-3,000 metrojn super la marnivelo la hektara produktokvanto de greno jam atingis pli ol 3,000 kilogramojn, kaj ĉiu enspezas meznombre pli ol 100 juanojn. La lagoj antaŭe formitaj de la tertremo nun fariĝis fiŝbredejoj de la komunumo. Utiligante la akvan energion de la lagoj, kelkaj produktaj brigadoj kune fun-

ktiigas hidroelektrajn. Riverakvo estas levita sur montojn, kaj dank' al tio la komunumanoj povas uzi kranakvon kaj irigacii kampojn. Kaj en draŝado, dispecigado kaj muelado efektiviĝis meĥanizo. Maljunulo Wen Yanping kun ĝojo diris al mi, ke kiam elektro unuafoje lumigis la ĉjang-vilaĝojn, la junuloj ektamburis, kantis kaj dancis ĉirkaŭ elektraj lampoj. Li, kiu uzis nur pinan torĉon dum plejparto de sia vivo, ne povis sin deteni de ridado, rigardante la elektrajn lampojn, kaj kantis antikvan ĉjang-an popolkan-ton ŝatatan de li:

*Jen pajla ĉapelo sur mia la kapo
min ŝirmas; de vento, de pluv'
kaj sunfrapo.*

*Ne diru: "Ĝi estas de olda
fasono."*

*Ĝi taŭgas por mi pli ol via brik-
domo.*



EL ĈINA MODERNA HISTORIO

SE ne estus la komunista Partio de Ĉinio, do ne estus la nova Ĉinio. Tio estas fundamenta resumo de la ĉina moderna historio de pli ol 100 jaroj.

La Komunista Partio de Ĉinio fondiĝis en 1921. Ĝi estas produktajo de la kombiniĝo de marksismo kun la ĉina laborista movado. Tiam Ĉinio estis duonkolonia kaj duonfeŭda socio. En la mezo de la 19-a jarcento, fremdaj kapitalistoj starigis fabrikojn en Ĉinio, kio naskis la unuajn industriajn laboristojn de Ĉinio. Antaŭ la fondiĝo de la Komunista Partio de Ĉinio, la nombro de la industriaj laboristoj de Ĉinio jam atingis ĉ. du milionojn.

La ĉina Revolucio de 1911 renversis la Qing-dinastian registaron kaj finis la feŭdan despotismon kun historio de pli ol 2,000 jaroj, sed ĝi ne plenumis kaj eĉ ne povis plenumi la grandan taskon de la ĉina popolo en la kontraŭimperiisma kaj kontraŭfeŭdisma demokratia revolucio. Post la malvenko de la Revolucio de 1911, Ĉinio dronis en pli malluma abismo sub la regado de la nordaj militaristoj. Kien iros Ĉinio?!

La venko de la rusa Oktobra Revolucio de 1917 alportis al Ĉinio marksismon-leninisman kaj montris direkton por la ĉina revolucio.

Kunlaboru!

TRADUKO aŭ alimani-eraj bonvolaj utiligoj de materialoj en nia gazeto estas permesataj kaj dezirataj. Ni petas nur, ke oni notu la fonton kaj sendu al ni 3 ekzemplerojn de la gazeto aŭ alia presaĵo, en kiu ĉerpajo aŭ

tradukajo el nia gazeto estas aperigita, kaj fotojn pri ekspozicioj en kiuj niaj eldonaĵoj estis montritaj. Per tio vi helpos ne nur nian gazeton, sed ankaŭ la Esperanto-movadon en Ĉinio.


LA RED.

LA FONDIĜO DE LA KOMUNISTA PARTIO DE ĈINIO

de TANG BAOLIN



Kamarado Li Dazhao



Kamarado Mao Zedong en sia juneco

La Movado de la Kvara de Majo en 1919 (vidu en la 5-a numero de 1979) skribis novan paĝon de la ĉina historio — Komenciĝis la ĉina nov-demokratia revolucio. La laborista klaso de Ĉinio, kiel sendependa forto, ascendis la politikan scenejon kaj akiris venkon de la movado. Tio multe kuraĝigis la vastajn amasojn de la ĉinaj intelektuloj, precipe revoluciajn intelektulojn, vidigis al ili fidintan forton de la ĉina revolucio. Ili decidis iri la vojon kombini sin kun laboristoj, konscie profundigis en la amason de laboristoj por propagandi marksismon kaj fari organizajn laborojn. Ili publikigis artikolojn, eldonis revuojn,

tradukis verkojn de Marks kaj Lenin, levis ideologian movadon de propagando de marksismo kaj tiel akcelis la kombiniĝon de marksismo kun la laborista movado. Dum tiu procedo, Chen Duxiu (1879-1942), profesoro de la Bejing-a Universitato, Li Dazhao (1889-1927), direktoro de la biblioteko de la Bejing-a Universitato kaj ekde 1920 profesoro de la universitato, kaj aliaj radikalaj demokratoj fariĝis marksistoj. Ĉio tio pretigis kondiĉojn por la fondiĝo de la Komunista Partio de Ĉinio.

En aŭgusto de 1920, fondiĝis en Shanghai la unua “Kompartia Filio” kun Chen Duxiu kiel

la respondeculo. Dum la Revolucio de 1911, Chen Duxiu sin okupis per revolucia aktivado. En 1915, li establis la revuon «Junularo» (poste alinomata «Nova Junularo»), kiu pledis por scienco kaj demokratio, forte kritikis la ĉinan tradician feŭdan penson, fariĝis pioniro de la Movado de Nova Kulturo kaj akiris renomon en la socio. Antaŭ la Oktobra Revolucio, li havis fortan inklinon al “franca civilizacio”. Influite de la Oktobra Revolucio kaj la Movado de la Kvara de Majo, li turniĝis al marksismo kaj faris kontribuon al starigo de la Partio. Sub la puŝado de la “Shanghai-a Iniciata Grupo”, kiun li gvidis, “kompartia filio” kaj “kompartia grupo” stariĝis unu post alia en la urboj Bejing kaj Guangzhou, en la provincoj Hunan, Hubei, Shandong, kaj en la eksterlandaj urboj Tokio kaj Parizo. Poste oni nomis tiujn organizojn komunista grupo kaj prenis la revuon «Nova Junularo» kiel organon de la komunistaj grupoj por laŭplane propagandi marksismon. En novembro de 1920, aperis monata gateto «Komunista Partio», kiu raportis pri kompartio, la Tria Internacio kaj diverslandaj komunistaj partioj kaj direktis partian konstruon de diversaj lokoj.



Kamarado Li Dazhao (la dua de maldekstre), ĉefa gvidanto en la periodo de fondado de la Komunista Partio de Ĉinio

Ĉiuj komunistaj grupoj havis sian marksisman studrondon, pere de kiu oni propagandis marksismon en populara lingvo. La Shanghai-a Komunista Grupo funkciigis "Postlaboran Lernejon" en la okcidenta parto de Shanghai, kie dense loĝis teksistoj. Kun altiĝo de konscio de laboristoj, laboristoj estis iom post iom organizitaj. En novembro de 1920, naskiĝis la "Shanghai-a Sindikato de Maŝinistoj", kiu estis la unua sindikato de la ĉinaj laboristoj. Poste en Shanghai oni starigis sindikatojn de presistoj kaj teksistoj kaj disvolvis diversajn revoluciajn aktivadojn inter laboristoj.

La Beijing-a Komunista Grupo estis kreita kaj gvidata de Li Dazhao, la elstara marksisto en la frua periodo de la ĉina revolucio. Ĉirkaŭ la Movado de la Kvara de Majo, li skribis pli ol 100 artikolojn propagandantajn marksismon kaj la Oktobran Revolucion. Sub lia gvido, la

Beijing-a Komunista Grupo prenis Changxindian, kie estis multaj fervojistoj, kiel bazlokon de sia organizado kaj tie establis "Postlaboran Lernejon". Li Dazhao kun la membroj de la grupo kaj studentoj donis lecionojn kaj prelegojn al laboristoj.

La Hunan-a Komunista Grupo estis kreita de Mao Zedong (1893-1976). En sia juneco li jam faris la decidon reformi la malnovan Ĉinion. Li kaj aro da revoluciaj junuloj organizis sin en "Nov-demokratian societion" por lerni progreseman teorion, fari socian enketon kaj informiĝi pri la sufero de la popolo. De la fino de 1919 ĝis la komenco de 1920, Mao Zedong venis al Beijing kaj Shanghai kaj tie, helpe de Li Dazhao kaj Chen Duxiu, li studis marksismajn verkojn kaj fariĝis firma marksisto. En septembro de 1920, Mao Zedong starigis la Hunan-an Komunistan Grupon en Changsha kaj sam-

tempe faris propagandon al laboristoj.

La Hubei-a Komunista Grupo estis fondita sub la gvido de Dong Biwu (1886-1975), kiu aliĝis al la Ligo Tong Meng Hui kaj partoprenis en la Revolucio de 1911, kiujn gvidis Sun Jatsen (Sun Zhongshan). Post fondiĝo de la grupo Dong Biwu prenis Wuhan-an mezlernejon, kiun li mem fondis, kiel centron kaj organizis "Studrondon de Marksisma Teorio", aperigis gazeton, starigis kulturan kurson por laboristoj, sindikaton, ktp.

Por oponi kontraŭ la registaro de la nordaj militaristoj, kiu konspiris kun imperiistoj por forvendi la naciajn interesojn, la Pariza Komunista Grupo faris propagandan laboron al ĉinaj studentoj kaj elmigrintoj en Francio, kaj kulturis multe da marksistoj kaj eminentaj gvidantoj por la Partio, ekzemple, Zhou Enlai, Zhu De kaj Deng Xiaoping k.a.

La apero de la diverslokaj komunistaj grupoj de Ĉinio kaj iliaj aktivadoj inter laboristoj markis la kombiniĝon de marksismo kun la laborista movado de Ĉinio. Jen maturiĝis la kondiĉoj por fondi progresan politikan partion de la ĉina laboristaro.

En la 23-a de julio de 1921, en iu domo de la franca koncesiita kvartalo en Shanghai okazis la kongreso de reprezentantoj de diverslokaj komunistaj grupoj. Ĝin ĉeestis 13 reprezentantoj, inter kiuj troviĝis Mao Zedong, Dong Biwu, Li Da k.a. Ĝin ĉeestis ankaŭ Maring (Nederlando), reprezentanto de la Tria Internacio. Chen Duxiu kaj Li Dazhao, famaj gvidantoj de la komunista movado de Ĉinio, ne ĉeestis ĝin pro aliaj laboroj.



En la kongreso la reprezentantoj diskutis ĉefe pri la fundamenta tasko kaj organiza principo de la Kompartio. La kongreso trapasis intensan disputadon kaj fine decidis konstrui la Komunistan Partion de Ĉinio, kun la Bolŝevika Partio de Sovetunio kiel sia ekzemplo.

En la kvara tago de la kongreso, iu spiono subite eniris en la domon. Pro tio la kongreso devis redukti sian tagordon kaj estis daŭrigita en Nanhu-lago de Jiaxing, ĉ. 100 kilometrojn sudokcidente de Shanghai. Por ŝirmi sin de spionoj, ili luis turisman boaton kaj daŭrigis la kongreson en mezo de la lago. La kongreso elektis la centran gvidantaron kun Chen Duxin kiel ĝia ĝenerala sekretario (sed poste Chen Duxiu turniĝis en oportuniston, kaj en novembro de 1929 li estis eksigita de la Partio), aprobis la statuton de la Partio, deklaris la fondiĝon de la Komunista Partio de Ĉinio, difinis ke la centra tasko de la Partio estas fari laboristan movadon, kaj fondis la "Sekretariejon de Laboranta Kombino de Ĉinio" kiel publikan organizon de la Partio gvidantan la laboristan movadon.

Kaj tiel fondiĝis la Komunista Partio de Ĉinio.

** La demokratia revolucio de Ĉinio konsistas el du etapoj: la malnova demokratia revolucio gvidata de la burĝaro, kaj la nov-demokratia revolucio gvidata de la proletaro (pere de la Komunista Partio de Ĉinio) ekde la Movado de la Kvara de Majo en 1919 ĝis la fondiĝo de la nova Ĉinio en 1949.*

La kunvenejo de la Unua Tutlanda Kongreso de la Komunista Partio de Ĉinio



Plezurboato sur Nanhu-lago de Jiaxing, en kiu la kongreso estis daŭrigata.





LA UNUA REVIZIITA "GRANDA VORTARO" DE LA NOVA ĈINIO ELDONITA

La nomita vortaro en la ĉina lingvo (ĉine "Ci Hai") konsistas el tri volumoj kaj estas jam eldonita en la lasta jaro. Ĝi kun 13,420,000 ideografiaĵoj enhavas 106,000 vortojn kaj esprimojn, kaj pli ol 3,000 ilustraĵojn, inkluzive proverbojn, literaturajn citaĵojn, ĉinajn kaj eksterlandajn personojn antikvajn kaj nuntempajn, verkojn, historiajn eventojn, sciencajn atingojn kaj sciencajn terminojn kaj aldone la forpasintajn ŝtatajn gvidantojn kaj famajn personojn de diversaj rondoj de Ĉinio.

ANTI-KVAJ FRESKOJ ELTROVITAJ EN SHANXI

Antaŭ nelonge oni trovis, en la suda parto de Shanxi-provinco en norda Ĉinio, Jiyi-templon konstruitan antaŭ 450 jaroj kun la nomitaj valoraj freskoj.

La templo estis konstruita por kulti Hou Ji kaj Bo Yi, du asistantojn de akvomastruma majstro Yu en antikveco laŭ la ĉina legendo.

La freskoj sur la orienta, okcidenta kaj suda muroj de la templo okupas areon de pli ol 130 kvadrataj metroj. Ili prezentas ĉefe ĉinajn mitojn. Sur ili estis pentritaj pli

ol 400 homfiguroj, dioj kaj diabloj kaj prezentataj primitiva kultivado, ĉasado, paŝtado, arbohakado, plugado, sarkado, falĉado, draŝado, eliminado de fiinsektoj k.t.p. La notoj sur la freskoj montras, ke la verkistoj de la freskoj estas popolaj artistoj. La pentraĵoj servas al arkeologoj kaj belartistoj kiel valorregaj materialoj en ilia studo.

ARTAJ PREZENTOJ POR LA NACIA FESTO

Por celebri la 30-an datrevenon de la fondiĝo de la nova Ĉinio, la Kultura Ministerio de Ĉinio okazigis artan festivalon, en kiu partoprenis ensembloj de provincoj, municipoj kaj aŭtonomaj regionoj. Krom dramoj, ili prezentis ankaŭ pli ol 200 programerojn, kiaj operoj, baletoj kaj aliaj artaj specoj. La plejparto de ili estas nove kreitaj. La baletoj "Ĝustatempa Pluvo", "Fiŝista Vivo de Liangshan", "Tintilo de Kamelo", "Ĝojo de Kamparanoj" kaj aliaj modlis heroojn sur diversaj frontoj de la ĉina socialisma konstruado. La dancoj "Ĉe Fonto", "Maturiĝis Rizo", "Kanto de Amo" kaj aliaj priskribis amon de gejunuloj. Ankoraŭ estis la virina kanto "Mi Edziniĝos al Vi" kaj la solkanto "Bela Knabino". Inter ili ankoraŭ estis la popola opero "Lan Huahua", la loka opero "Nupto de Lanternodantoj" kaj la opero "Descendi Monton" adaptita laŭ la epopeo "Biografio de la Reĝo Gesar", kiu vaste cirkulas inter la tibeta popolo.

ENSEMBLOJ DE ĈPLA PREZENTIS ARTAJN PROGRAMEROJN

Celebrante la Nacian Feston de la nova Ĉinio, ensembloj de la

Ĉina Popola Liberiga Armeo prezentis pli ol 60 artajn programerojn. Inter ili prezentitaj en la ĉefurbo Beijing (Pekino) sin trovis la dramoj "Generalo Zhu De", "Biografio de He Long" (la unua parto) kaj "Chen Yi Descendis Monton", kiuj prikantas proletarajn revoluciojn de la maljuna generacio; la dramoj "Por la Patrujo" kaj "Turnakvo" ambaŭ kun aktuala vivo kiel la temo kaj la revolucia historia opero "Impona Nupto"; kaj muzikaj, dancoj, akrobataĵoj ktp. En garnizonejoj ili prezentis por ĈPLA-anoj la operon "Alianciĝo ĉe Liangshan" kaj la dramojn "Brilaj Steloj en Tiu Ĉi Nokto" kaj "Perlo sur Step'o". Ĉiuj tiuj programeroj ricevis bonvenon de armeanoj kaj polanoj.

EKSPozICIO DE PENTRAĴOJ DE LABO- RISTOJ KAJ OFICISTOJ

Lastatempe estis okazigita la ekspozicio de pentraĵoj de laboristoj kaj oficistoj de Beijing, Tianjin kaj Shanghai. La montritaj 217 pentraĵoj estas verkitaj de 276 belartaj amatoroj. Ili inkluzivas ĉinstilajn pentraĵojn, olepentaĵojn, ksilografajojn, akvarelojn, karikaturajn, bildrakontojn, afiŝajn bildojn, skulptaĵojn kaj modlaĵojn.



IKSO:


Suspektemo*

Ilustrita de YIN FENGGE

*Okazis ke perdis kampulo hakilon
kaj ŝteli suspektis najbaran la filon.
Post kaŝa observ' pri l' junulo najbara,
li trovis ke l' jeno 'stas tute jam klara:
Ja liaj parolo kaj paŝ-maniero
plenplene perfidas plenumon de ŝtelo.*

*Post tagoj l' hakilon tiu arbarmeze
retrovis, lasitan de li mem forgese.
Kaj nun li certigis al si kun klarvido,
ke dece kondutas lia suspektito:
Ĉu ties paŝad', ĉu parol', ĉu ridsono
lin montras senkulpa, honesta persono.*

* La poemo estas adaptaĵo de la samtitola fablo el la libro "Lie Zi" laŭdire verkita de Lie Yukou en la periodo de la Militantaj Regnoj (476—221 a.K.). Plejparto de la enhavo de la libro estas popolarakontoj, fabloj kaj mitoj.



Kurantaj Aferoj


ARTEFARITA KARBONA ARTIKO SUKCESE FARITA

Artefaritaj karbonaj artikoj kaj ostoj estas sukcese faritaj en Ĉinio. Kompare kun la ĝenerale uzataj surogatoj el alojo, plasto kaj porcelano, tiaj artikoj kaj ostoj estas pli malpezaj, eltenemaj kontraŭ froto, korodo kaj premo, senelektrolizaj, senvenenaj, adaptiĝemaj, kun-kreskiĝemaj kaj neekscitaj al homa korpo. Ili estas sukcese faritaj de la Unua Popola Hospitalo kaj la Instituto de la Karbonaja Fabriko de la urbo Jilin. Antaŭ nelonge, la Unua Popola Hospitalo de Jilin sukcese faris operaciojn al du pa-

cientoj por anstataŭigi ties malsanan artikon aŭ oston per la artefaritaj.

GENERA CENTRALO DE PANDOJ KONSTRUATA EN ĈINIO

Ĉinio konstruas generan centralon de pandoj en la distrikto Yueba de Shaaxi (Ŝenhi)-provinco, unu el la produktoj de pandoj. Tiu distrikto troviĝas en Qinling-montaro, kie vivas, krom pandoj, ankaŭ aliaj pli ol 20 animaloj raraj en la mondo, inkluzive de hapalo kaj bubala antilopo. Tie kreskas ankaŭ raraj specioj de abio kaj piceo. La Ŝtata Konsilantaro jam decidis fondi tie naturan protektejon por protekti kaj generigi pandojn en bonigita natura medio. Aktiva konstruado nun iras en tiu loko.



Ilustrita de MIAO DI

LA NACIA PLADO DE NEDERLANDO


En Nederlando kun malalta tero, oni prenas pladon el terpomoj, bulboj kaj karotoj kiel nacian pladon. En la 3-a de oktobro de ĉiu jaro, preskaŭ ĉiuj nederlandanoj prenas tian manĝaĵon.

La 26-an de majo, 1574, hispanaj trupoj ĉirkaŭis la belan nederlandan urbon Leiden. La loĝantoj de la urbo petis helpon de iu princo. La lasta konsentis ilin helpi, sed postulis, ke ili persistu tri monatojn en rezistado, por ke li havu tempon por ekipi siajn militŝipojn.

La loĝantoj en Leiden rezistis 90 tagojn, tamen ankoraŭ ne alvenis helpa trupo. Elĉerpiĝis la municio kaj greno en la urbo, tamen ankoraŭ ne aperis la helpa militŝiparo. La princo alsendis leteron al la loĝantoj en Leiden. Li skribis, ke li intencis breĉigi la digon de kanalo,

por ke lia ŝiparo povu veturi rekte al Leiden, sed la inundakvo profundis nur je kelkaj centimetroj, tial la plano fiaskis. Por ne fariĝi militkaptitoj, la loĝantoj en Leiden persistadis en rezistado malgraŭ turmento de malsato.

La 2-an de oktobro, pluvegis tut-tage kaj ĉie estis akvo profunda je ĉ. 1 metro. Fine la ŝiparo de la princo jam povis alveturi. Informiĝinte pri tio, la hispanaj trupoj tuj retiriĝis de Leiden. Rimarkinte ilian evakuon, la loĝantoj en Leiden tuj sin jetis al iliaj pozicioj kun la sola deziro trovi manĝaĵojn. Sed la hispanoj forportis ĉion bongustan kaj postlasis nur terpomojn, bulbojn, karotojn kaj aliajn krudajn manĝaĵojn. Ili do kunmetis la restaĵojn en kaldronojn kaj ekmanĝegis post kuirado. Tio okazis vespere de la 3-a de oktobro, 1574.



PLUVA ARBO

Se vi promenas sur bulvardo de Kolombo je varmega somera tagmezo, vi povas subite trafi pluvon, kiu malsekigas viajn kapon kaj piedojn. Sed kiam vi haste malfermas vian ombrelon aŭ klopodas por trovi lokon por vin ŝirmi de la neatendita pluvo, vi trovas ke la ĉirkaŭaĵo restas seka kaj forte brilas la suno en la ĉielo. Mirinda fenomeno!

Tian duŝon donas "pluva arbo" de Srilankao. La folioj de tia arbo longas je pli ol unu futo. Simile al floroj en fabelo de H. Andersen, ĝiaj kavaj folioj kun iom elstara rando povas kliniĝi malsupren aŭ sin etendi. Kiam vesperiĝas, ili komencas sorbi vaporigintan akvon en la aero. En tagmezo, kiam ardas la suno, la ĉeloj de la folioj ellasas la akvon pro varmege kaj surprizas la preterirantojn per duŝo, tiu tamen estas refreŝiga kaj agrabla.

INTERESAJ

MANIEROJ

DE ŜALUTO

Diferencaj estas la salutaj manieroj de diversaj nacioj. Plejparto de la eŭropaj nacioj salutas unu alian je renkontiĝo aŭ adiaŭo per manpremo, levo de sia ĉapelo kaj manŝvingo. Tamen estas nemalmultaj nacioj, kiuj agas alimaniere.

Ĉe popoloj en sudorienta Hindio estas aparta salutmaniero: Ili premas siajn buŝon kaj nazon al la vango de siaj gastoj aŭ karuloj,



forte enspiras kaj diradas: “Flarumin!”

Ĉe loĝantoj en Novzelando hodiaŭ ankoraŭ konserviĝas kutimo intertuŝi siajn nazojn je renkontiĝo.

Kiam ajnu-aj viroj de Hokajdo renkontiĝas, ili unue palpas la manplaton kaj levas la manon al la frunto kaj poste ekpalpas siajn lipharojn por esprimi saluton.

Popolanoj en okcidenta Afriko salutas unu alian je renkontiĝo per frapado al la brusto per manplato.

Certaj popolanoj en centra Afriko salutas unu alian per riverenco, manklako kaj bondeziraj vortoj.

PLEJ ĜIGANTAJ KONSTRUAĴOJ DE LA MONDO

La plej vasta domo por scienco estas la usona Astronaŭtika Centro Kennedy, kie plenumiĝas la fina muntado de la kosmoŝipoj Apolono por veturo al la luno. Tiu konstruaĵo kun ŝtala framo altas 160.2 metrojn, larĝas 157.89 metrojn kaj longas 218.24 metrojn. Ĉiu el ĝiaj kvar partoj havas pordegon kun alteco de 140.21 metroj. Tiu konstruaĵo kostis 108,700,000 usonajn dolarojn.



Inter la registaraj domoj de la mondo, la Pentagono de Usono okupas plej vastan areon. La plej longa el ĝiaj kvin lateroj estas 280.73 metroj kaj la kvin lateroj longas entute 1,371 metrojn. Ĉiutage 29,000 personoj laboras en ĝi. La domo enhavas 44,000 telefonojn, kies fadenoj havas totalan longecon de 257,440 kilometroj. Ĝiaj koridoroj longas entute 27.353

kilometrojn kaj la nombro de ĝiaj fenestroj estas 7,748.

La plej alta domo en la mondo estas la Ĉielskrapanto de Usono. Tiu 110-etaĝa koloso altas 443.18 metrojn. Se oni enkalkulas la du televidajn antenojn sur ĝi, ĝia alteco atingas 548.64 metrojn.

La plej alta turo en la mondo estas la Varsovia radio-turo de Pollando. Ĝi altas 645.4 metrojn kaj pezas 550 tunojn.

La plej alta fumtubo en la mondo estas tiu de la Internacia Nikelo-Kompanio de Kanado. Ĝi altas je 397.68 metroj. Ĝia diametro ĉe la bazo estas 34.5 metroj kaj tiu ĉe la supro estas nur 15.82 metroj.



KARIKATURO

Ripeti lecionon
de MIAO DI



La haroj de la
avo tie, sed
miaj ĉi tie!
de MIAO DI

Mia kara, ho-
diaŭ vi mal-
fruiĝis.
de JIANG FAN



NOVAJ ĜEMELAJ URBOJ

La ĉina urbo Qingdao (Kingdaŭ) kaj la japana urbo Simonoseki de Jamaguĉi oficiale ligiĝis kiel ĝemelaj urboj. La subskriba ceremonio okazis en la Urbana Halo de Simonoseki, posttagmeze de la 3-a de la lasta oktobro. La traktaton subskribis Liu Zhongqian, ĉefo de la revolucia komitato de Qingdao, kaj Izmita Joŝizugu, urbestro de Simonoseki. Post la ceremonio ambaŭ flankoj plantis memorigajn arbojn apud la halo.

Ankaŭ la ĉina urbo Guilin (Gujlin) kaj la japana urbo Kumamoto fariĝis ĝemelaj urboj. La subskriba ceremonio okazis antaŭtagmeze de la 1-a de oktobro pasintjare, en Kumamoto. Post la ceremonio ambaŭ flankoj donacis reciproke silkajn flagojn. Por memori la ĝojigan aferon, la reprezentantoj de ambaŭ urboj transplantis 90-jaran osmantujon sub la antikva urbo de Kumamoto.

«KULTURO KAJ ARTO DE SOCIALISMA JUGOSLAVIO» EN BEIJING

La ekspozicio «Kulturo kaj Arto de Socialisma Jugoslavio» estis okazigita en Beijing, en la 10-a de la lasta oktobro. Inter la pli ol 200 ekspoziciitaj objektoj troviĝis fotoj, pentraĵoj, skulptaĵoj, murtapiŝoj, libroj kaj aliaj presajoj pretigitaj de la respublikoj de Jugoslavio. La objektoj konigis la historion, la revolucion batalon kaj la ekonomian kaj kulturen konstruadon de la jugoslava popolo.

ĈINA PENTRISTETO EN PARIZO

La 10 pentristetoj, kiuj ricevis la unuagradan premion en la internacia konkurso de infanaj pentraĵoj aranĝita de Unesko, faris komunan pentraĵon en ĝia pariza sidejo je la 30-a de septembro pasintjare. 5



pentristetoj en la aĝo de malpli ol 8 jaroj, inter kiuj estis ankaŭ la ĉina infano Hu Xiaozhou (7-jara), kune faris sentitolan pentraĵon. Hu Xiaozhou pentris flugantan hirundon kaj du kokidojn promenantajn sub floroj. La strukturo kaj tekniko de tiu pentraĵo estis tre ŝatataj de la ĉeestantoj.

La pentraĵo de Hu Xiaozhou «Pendolado sur la Luno» estis premiita per la unuagrada premio en tiu internacia konkurso.

LA BERLINA FILHARMONIO EN BEIJING


La Berlina Filharmonio faris en Beijing (Pekino) unuafokan prezentadon en la 29-a de oktobro de la pasinta jaro. La orkestro estis direktata de la tre fama kompetentulo sinjoro Herbert von Karajan. La orkestro ludis la 39-an Simfonion en E majora kun bemolo de Mozarto kaj la Unuan Simfonion en C minora de Brahms. La eminenta direktado estis varme aplaudata de pli ol 5,000 aŭskultantoj.

La orkestro prezentis al ĉinaj muzik-amantoj ankaŭ famajn verkojn de Betoveno, Devorak kaj Morsorski. La Sepa Simfonio de Betoveno estis kune ludata de la germanaj muzikistoj kaj la Ĉina Centra Filharmonio, sub la direktado de sinjoro Karajan.

La 71-jara sinjoro Karajan estis instruisto de sinjoro Seiĝi Ozava, fama japana direktisto konata por la ĉina popolo. Dum la pli-ol-20-jara direktado al la orkestro sinjoro Karajan senĉese altigis la teknikon de la ludo kaj gajnis tre altan reputacion en la mondo.

VIZITO DE GREKAJ ARTISTOJ AL ĈINIO

La Greka Ŝtata Teatro kun 45 membroj, kiu estas tre konata en la mondo per sia ludo de klasikaj tragedioj, vizitis Ĉinion en oktobro de 1979, sub la gvido de direktoro sinjoro Alexis Minotis. La artistoj de la teatro prezentis por la ĉinaj spektantoj du dramojn «Prometeo Ligita» kaj «Finicino», tre famajn grekajn klasikajn tragediojn. La artistoj faris dekfoje prezentadon en Shanghai (Ŝanhajo), Nanjing (Nankino) kaj Beijing. Ilia prezentado estis varme laŭdata de la ĉinaj spektantoj.



Sceno el la greka klasika tragedio "Prometeo Ligita"

EKSPOZICIO DE ĈINAJ PENTRAĴOJ EN TURKIO

La ekspozicio estis okazigita en la Ŝtata Belarta Eksponejo en Ankaro, en oktobro de 1979. Tio estis la unua fojo por tia ekspozicio en Turkio. La ekspozicio montris 54 pentraĵojn de eminentaj ĉinaj junaj kaj maljunaj pentristoj.

S-ro Herbert von Karajan en direktado



Mi kore dankas vin pro la regula sendado de via bela revuo EPC. Mi nepre devas sciigi al vi, ke ĝi multe pliboniĝis dum la lastaj monatoj. La varia enhavo, ĉarmaj bildoj kaj rubrikoj kiuj mankis antaŭe nun aperas, kaj vere mi gratulas vin pro la progreso. Estas laŭdinda la klara kaj simpla stilo. Ankaŭ ne mankas la klarigoj de novaj vortoj.

— **Kara Justis**, FR Germanio

Tamen mi diris al vi, ke depost longa tempo mi legas EPC kaj neniam ĝis nun mi havas tiom da plezuro legi ĝin. Vi progresis ĉiumaniere kaj mi gratulas vin forte. La artikoloj de EPC estas nun diversaj, altirantaj, vivantaj, profundaj kaj plenaj de inteligento. Krom tio la fotoj tre belaj parolas al koro, precipe tiuj kiuj estas faritaj kolore.

— **A. Jacquel**, Francio

Mi estas telefona muntisto kaj laboras per instalado de diversaj telefonaj ekipaĵoj ĉie en Hjørring kaj en la ĉirkaŭo, kaj kelkfoje kiam mi laboras en la urbo mi povas veturi hejmen por tagmanĝi, mi havas duonan horon libere, kaj vere festotago estas tiu, kiam la leterportisto venis kun mia ĉina gazeto. Mia

edzino kiu bedaŭrinde ne scias Esperanton, sed feliĉe tre simpatias al ĝi, kutimas meti la gazeton en la mezon de la tablo, kaj tiam ni ambaŭ tuj devas rigardi la bildojn, kaj la granda ĝojo regas, mi devas traduki kaj rakonti al ŝi, kompreneble mi preskaŭ forgesas ion manĝi dum tiu duona horo.

Homoj kiujn mi konas forte miras, ke mi povas legi gazeton kaj librojn el Ĉinio, ĉar Ĉinio situas ja tiom longe for de ni, sed ili ekkomprenas ke Esperanto ja vere estas uzata tre vaste en la mondo, cetere ĉiuj tre admiras kaj laŭdas vin, unu el miaj kolegoj kun kiu mi ĉiutage laboras ofte diras al mi: "Mi treege ŝatus vititi Ĉinion."

— **Forgen H. Eriksen**, Danlando

Ĉiuj Esp-novajoj kaj artikoloj interesas ĉiam la esperantistojn, aparte la disvastiĝo kaj la movado de la lingvo en Ĉinio kaj en la mondo. Mi ne povas diri, kiujn fotojn mi plej ŝatas; ĉiuj estas ege belegaj kaj originalaj en sia speco.

Laŭ mia opinio, via gazeto estas miriga rimedo por disvastigi idealon de paco, kulturo, amikeco kaj amo en la tuta mondo. Mi havas ne-

niajn proponojn pri la redakta laboro kaj prezentado, kiuj estas nepre perfektaj. Daŭrigu tiun vojon!

— **Lepage Georges**, Belgio

Mi estas leganto jam de pli ol 20 jaroj, kaj verdire iutempe la gazeto ne donis intereson al alilandanoj. Mi ankaŭ inertece restadis kiel abonanto, ĉar la prezo estas tro mal-kara. Sed lastatempe mi atendas senpacience atingon de la gazeto. Mi proponas aperigi libron pri la vivo de granda ĉefministro Zhou Enlai en Esperanto.

— **Azuma Tošihumi**, Japanio

Mi fine proponas al vi, ke vi komencu demando-rubrikon en EPC por tiaj apartaj demandoj. Mi supozas, ke ne tre multaj homoj skribas leteron por demandi tiajn aferojn sen kaŭzo. Sed demando-rubriko stimulas. Krom tio vi havas eblecon konstati, kien la demando de legantoj sin direktas. Vi mem povas fari elekton el la demandoj. Por la legantoj rubrikoj kun ĉiuspecaĵoj povas esti interesaj kaj ĉiaokaze variigitaj.

— **J. M. Van der Hoeven**,
Nederlando

KORESPONDI DEZIRAS

* Baszowiecki Vieslav, 49-300 Brzeg, ul Rynek 8m6, Pollando, 21-j. dez. kor. kun ĉinaj kaj japanaj geesp-istoj.

* S-ro Lagoutte A., Le Hameau au Soleil, F66700 Argeles sur Mer, Francio, kun ĉinaj geesp-istoj.

* S-ro Janko Struc, 17-j., koŝaki 86, 62000 Maribor, Jugoslavio, kun samaĝuloj tutmonde.

* Ruvejn Lubo, 20-j. junulo, 774 Salem St. Teaneck, NJ 07666, Usono/USA, kun ĉinaj gesamaĝuloj.

* Halvor Kvisle, boks 111, N-3425 Reistad, Norvegio, 30-j. instruisto, kun geesp-istoj de Ĉinio, k.a. landoj de Azio, Afriko k. Latin-Ameriko. Intereso: naturo, fotado, pm.

* Detlef Mainz, 701 Leipzig, Sha-

kespeare str. 60, DDR, 19-j. lernanto en baletolernejo, kun ĉinaj esp-istoj.


* George Partlow, 544 West 12th Street, Juneau, Alaska 99801, Usono/USA, 32-j. komputera programisto, dez. kor. tutmonde, aparte kun ĉinaj esp-istoj, pri montgrim-pado, klasika muziko, ŝako.

* Rasolofa Roger, Lot I.V.K.53 TER, Antanjombe-Ambahimansrina, Antananarivo, Madagascar, kun ĉinaj esp-istoj.



Renkonto de papilioj

Malsata turdido



FOTOJ PRI NATU-
RAJ BELAĴOJ FA-
RITAJ DE E-ISTOJ

de Jean Demonty (Belgio)


Sovaĝaj anasoj sur glacia lago






Ĉasisto Forĵetinta Sian Pafilon

de la Shanghai-a Belarta Studio



1. Laŭdire la vulpo sur Dingtian-monto povas transformiĝi en lupon kun 2 dentegoj, 3 okuloj, 4 oreloj kaj 5 piedoj.



2. Tion aŭdinte, iu ruza vulpo alivestis sin per prunteprenita lufelo.




3. Iun tagon timema ĉasisto iris sur monton por ĉasi. Kun pafilo en mano, li iris padon, tute sen kuraĝo.



4. Subite la "lupo" ekhurlis, kio forte teruris la ĉasiston, ke li forĵetis sian pafilon kaj forkuris.



5. La "lupo" ĝoje prenis la pafilon kaj distraĉis sin per ĝi, kaj rezulte de tio ĉiuj ĝiaj kugloj elpafiĝis.



6. La "lupo" enŝteliĝis en la hejmon de la ĉasisto kaj forprenis liajn kuglojn.



7. Tamen la "lupo" ne povosciis pafi per la pafilo, sekve li sendis maljunan lunon venigi la ĉasiston.



8 La aroganta "lupo" atendis la ĉasiston sur monteto.



9. La ĉasisto svenis terurite je ekvido de la "lupo".



10. Informiĝinte pri tio la maljuna ĉasisto alrapidis. Li mortigis ambaŭ bestaĉojn per du pafoj.



11. La timema ĉasisto vekigis kvazaŭ el sonĝo kaj aŭdis la averton de la maljuna ĉasisto: "Se ĉasisto forjetas sian pafilon, li povas fari nenion kontraŭ rabobestoj."

815 N



孔雀之身
 己未年 袁晓岑 画

